

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 546 (5) MAJO 1951



Maoria vilaĝo (*vidu p. 137*)

44a Jaro

Majo 1951

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al

N-ro 546 (5)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Fondinto : H. HODLER

**Jara abono : 8 ŝil. anglaj (kun membreco
kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)**

Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Tarifo por reklamoj :

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

1 paço £6	$\frac{1}{2}$ paço £3
$\frac{1}{4}$ paço 30 sêl.	$\frac{1}{8}$ paço 15 sêl.

Palais Wilson, Genève, Svis.

Anoncetoj pri korespondado :

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu du da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldon **numero 6500**



Enhavo

Specialaj artikoloj :

Ĉefaj artikoloj :		paĝo
Paska kunsido : D-ro P. Kempeneers	..	129
Eksiĝo de EAĈSR : Estraro	..	130
La Estraro alvokas la junularon	..	131
Esperanto en Portugalujo	..	132
Estontaj Kongreslokoj : Hans. Jakob	..	133
Prelegvojaĝo de Prof. D-ro Lapenna	..	134
La Maorioj : Y. M. Canty	..	137
Donu al mi tempon : Averta : (poemoj) B. Clark		139
La Vojaĝo de la Maorioj : (poemo) B. Clark	..	140
Belartaj konkursoj de U.E.A.	..	155
La alfabeto de la reĝo : D-ro A. Metraux	..	156

Konstantaj rubrikoj :

Tra la mondo esperantista	..	..	..	..	..	..	135
Tra la libraro : <i>Naŭlingva Etimologia Leksikono</i> (Prof. W. E. Collinson)	..						143
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..		144–158
Nia Forumo : <i>Pri redaktado ; Del. Servo</i>				..	..	..	145
Enigma konkurso	..	..	..	..	..	..	147
Niaj Kunlaborantoj : J. A. Saldanha Carreira				..	..	..	149
Radio	..	..	..	..	..	..	150
Felietono	..	..	..	..	..	..	151
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	..	159
Internacia konkurso 1951	..	..	..	..	..	..	160
<i>Pro premo de oficialaj informoj ni devis ellasi kelkajn konstantaĵojn ĝis venonta n-ro.)</i>							

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 546 (5)

Majo 1951



D-ro P. Kempeneers :

Paska kunsido

La Estraro de U.E.A. kunvenis de la 23-a ĝis la 26-a de Marto 1951, en la Esperanto-Domo, propraĵo kaj sidejo de la Asocio.

La Prezidanto, S-ro Malmgren, ne povis ĉeesti pro la malsano kiu de pluraj monatoj malhelpas lin partopreni en la gvidado de U.E.A.; ĵus antaŭ la kunveno alvenis sciigo ke lia sanstato multe pliboniĝis; ĝi jam permesis al li foriri el la hospitalo kaj reiri en la hejmon. La Estraro sendis al li korajn bondezirojn por baldaŭa kaj kompleta resaniĝo.

La kunsidojn ĉeestis S-ro Hans Jakob, el Genève, D-ro Lapenna, ĵus alveninte el prelegvojaĝo tra Belgujo kaj Nederlando, S-ro Oliver, el Rickmansworth; mi havis la taskon prezidi, kiel vic-prezidanto anstataŭanta la prezidanton. Mi vere ĝojis pro la bona atmosfero kiu regis dum la kunsidoj, amika, komprenema kaj kunlaborema.

La Estraro ekzamenis multajn punktojn. Multaj el ili retroviĝas ĉiujare sur la tagordo; ili rilatas al la spezoj kaj al la ĉiutaga vivo de la Asocio. Komento pri ili ne estas utila, escepte por mencii ke la financa stato pliboniĝas, malgraŭ malfavoraj faktoj: timo pri minacanta milito, malfacilaĵoj en la transsendo de mono

de unu lando al la alia, malsamaj ideologioj.

Unu plian fojon, la Estraro miris pri la bona laboro efektivigita en la Centra Oficejo sub la lerta gvidado de la Ĝenerala Sekretario, S-ro Goldsmith; dank' al li, la administrado denia Asocio estas efikoplena, akurata, preciza. Ĝi donas plenan fidon al la membroj, kiuj regule ricevas siajn publikaĵojn.

La Estraro pli kaj pli partoprenas en la ĉiutaga vivo de la Asocio, kaj la Estraranoj iom post iom fariĝas kvazaŭ ministroj, kiuj gvidas parton de la laboro, laŭ plano starigita dum la pasinta jaro.

La kontakto kun la landaj asocioj, la lokaj societoj kaj la unuopaj membroj multe pliboniĝis dum la lastaj jaroj, precipe dank' al multaj prelegvojaĝoj entreprenitaj propagandcele de la Estrarano D-ro Lapenna. Li sinsekve vizitis Islandon, Francujon, Britujon, Italujon, Belgion, Nederlandon. Kun eksterordinara entuziasmo li alportas al ĉiu loko, kiun li vizitas, fajreron kiu rapide ekflamigas la deziron pli bone labori por nia afero. Samtempe li povas raporti al la Estraro la dezirojn kaj la kritikojn, kiujn li aŭdas kaj la tendencojn kiuj esprimiĝas.

Tiu persona kontakto, kiun ni esperas daŭrigi kaj pliampleksigi, se eble, estas grava faktoro de progreso de nia Asocio, ĉar ĝi plivigligas la rilatojn inter la Centro kaj la diversaj partoj.

Speciale interesa estas la ĝojiga fakto, ke pli kaj pli montriĝas plialtiĝo de la kultura nivelo de nia movado. Ĝi enhavas en si ne nur belajn promesojn, sed jam multajn konkretajn faktojn. La kongreso en Parizo tiurilate superis la antaŭan, kaj multaj decidoj estis alprenitaj por ke la kongreso en Munkeno almenaŭ egalu tiun de Parizo.

La programo de la Internacia Somera Universitato enhavos plurajn prelegojn farotajn de Universitataj Profesoroj; la Oratora konkurso kies temo estos *La Idea Signifo de Esperantoreokazos*; belartaj konkursoj

estas sur la programo. La laborkunsidoj denove dividiĝos en kvar sekcioj, kaj la spertoj akiritaj en Parizo helpos plibonigi ankoraŭ la labormetodojn.

Tiuj estas faktoj, kiujn ĉiu konscia Esperantisto povas uzi en sia aktiveco; ili ne estas trompaĵo; ĉiu, kiu havas orelojn por aŭskulti kaj okulojn por vidi, vojaĝu al la Internacia Kongreso, kaj li povos konvinkiĝi pri la multaj uzoj de nia lingvo, kaj pri ĝia kultura kaj homa valoro.

Bedaŭrinde ombreon alportis sciigo pri la eksigo de la Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Pri ĝi la Estraro alprenis *deklaron*, kiu troviĝas en alia parto de nia gazeto.

La Estraro akceptis la inviton de Norvega Esperantista Ligo por la Universala Kongreso en 1952.

Eksigo de E.A.Ĉ.S.R.

PER sia letero de la 31a de dec. 1950, ricevita en la Centra Oficejo en Rickmansworth la 24an de jan. 1951 la Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko ekzigis el U.E.A. “por helpi plifortigon de la esperantista movado en nia ŝtato kaj en la ceteraj landoj de popola demokratio.”

En aparta artikolo aperinta en la januara numero de *Esperantista*, revuo por Esperanto en Ĉeĥoslovakujo, la prezidanto de E.A.Ĉ.S.R., S-ro A. Malik, pliprecizigis sian starpunkton en tiu afero. Laŭ li, la Esperanto-movado en “popol-demokratiaj landoj” ne povas esti ligita al U.E.A., ĉar—resume—U.E.A. estas :

1. “strikte neŭtrala” kaj “tiela neŭtraleco estas malbona” ;

2. ĝia “gvidantaro dum la 35-a Universala Kongreso en Parizo fuŝtraktis la Stokholman alvokon per senfrukta babilado pri paco.”

3. en Anglujo “formortis libereco de parolo, formortis demokratio kaj hodiaŭ tie estras dolaro kaj polica bastono” kaj la “U.E.A.-gvidantaro certe estas influata de tiu ĉi realo kaj tial restas nenio krom disiĝo.”

La Estraro de U.E.A. registris la decidon. Ĝi fieras, ke eĉ la prezidanto de la E.A.Ĉ.S.R. estas devigata rekoni la neŭtralecon de U.E.A., kaj ĝi bedaŭras, ke pro tiu neŭtraleco la E.A.Ĉ.S.R. ne plu povas esti membro de U.E.A.

La Estraro kun fiero konstatas, ke U.E.A. estas la lasta internacia

La Estraro alvokas la junularon

partopreni la Oratoran Konkurson

EN Munkeno okazos oratora konkurso por la junularo. La du ĝisnunaj konkursoj montris, ke inter la gejunuloj troviĝas bonaj talentoj. Tamen la rezultoj ne estis kontentigaj, ĉar la partopreno de la gejunuloj estis tro malgranda. La Estraro esprimas la deziron kaj la esperon, ke la sekvan Oratoran Konkurson partoprenu multaj gejunuloj el ĉiuj landoj. La temo estas jam fiksita: *La idea signifo de Esperanto*. Ĝi estas sufiĉe larĝa por ebligi al ĉiu partoprenanto esprimi sian penson.

La regularo pri la konkurso troviĝas ĉisube. La konkursantoj bonvolu ĝin atente tralegi. Ĉiu konkursanto bonvolu sciigi sian nomon kaj adreson al la Loka Kongresa Komitato en Munkeno, Engelbertstr. 7, München-Pasing, Germanujo, plej malfrue antaŭ la tago de la kongresa komenciĝo.

Gejunuloj, jen okazo por vi aktive partopreni en la laboroj de la Kongreso kaj riĉigi ĝin per via freŝo

kaj entuziasmo, per novaj ideoj kaj pensoj. Ne hezitu kaj ne timu! La oratora tribuno vin atendas!

Oratora Konkurso

Regularo

La oratorajn konkursojn de U.E.A. rajtas partopreni ĉiuj gejunuloj ĝis 28-jaraj, kiuj aliĝis al la koncerna U.K. kaj partoprenas ĝin.

La partopreno en la konkurso estas senpaga, sed ĉiu partoprenonto devas sin skribi anonci al la prezidanto de la Komisiono minimume unu tagon antaŭ la tago de la konkurso. Estas tamen dezirinde, ke la partoprenontoj anoncu sin kiel eble plej frue al la L.K.K.

Por ĉiu oratora konkurso, la Estraro de U.E.A. nomas Komisionon, konsistantan el prezidanto, du membroj, kaj du anstataŭontojn.

La Komisiono decidas pri la temo aŭ la temoj de la konkurso, fiksas la limtempon de la paroladetoj, akceptas la aliĝojn al la konkurso kaj decidas pri la premioj. La Komisiono decidas per plimulto de voĉoj.

La Oratora Konkurso okazas en Esperanto. La kandidatoj ne rajtas trapasi la fiksitajn limtempon. Ili devas paroli libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notetojn.

La nomojn de la unuaj tri konkursantoj oni proklamas dum unu el la kongresaj kunsidoj kaj publikigas en *Esperanto*.

Eksiĝo de EAĈSR

privata organizaĵo, kiu—surbaze de korekte komprenata rolo de tuthome neŭtrala lingvo—sukcesis konservi dum longa tempo membrojn kaj en Okcidento kaj en Oriento, kio antaŭ la historio estas nova pruvo pri ĝiaj sinceraj klopodoj resti universala. Ĝi bedaŭras, ke tiu universaleco nun komencis rompiĝi, sed la respondeco por tiu ago troviĝas ekster ĝia povo.

*Estrara Kunsido,
Pasko 1951.*

Esperanto en Portugalujo

La malpermeso fine forigita!

Bela pravigo de la supertendenca rolo de U.E.A.

EN la momento de presigo ni ricevis de nia ĉefdelegito kaj komitatano S-ro J. Saldanha Carreira (*vidu ankaŭ p. 149*) la ĝojigan sciigon, ke la Prezidanto de Portugalujo nuligis la dekreton kontraŭ Esperanto en tiu lando.

Jam de la unua momento, kiam la nigra novaĵo pri la malpermeso estis ricevata, S-ro Saldanha Carreira en kunlaboro kun U.E.A., klopodis pri nuligo de tiu sensenca dekreto. S-ro Saldanha Carreira aktivis senĉese je kontaktado de altaj instancoj, ministroj, kaj aliaj kaj lerte gvidis agadon kontraŭ la decido. U.E.A. en konsulto kun nia portugala pioniro direktis leterojn kaj dokumentojn al diversaj instancoj kun la celo apogi la pledadon de la surlokaj samideanoj.

Restas neniam dubo pri tio, ke la supertendenca karaktero de Universala Esperanto-Asocio estis la plej forta argumento kontraŭ la malpermeso de Esperanto en tiu lando. Al S-ro Saldanha Carreira devas direktiĝi la profunda danko kaj gratuloj de la tuta Esperanto-movado pro lia entuziasma, fervora kaj malegoisma laboro en ĉi tiu afero. U.E.A. fieras posedi tiajn homojn en siaj vicoj.

Estontaj Kongreslokoj

kongresanoj estas certa. En la sama pensaro troviĝas la kondiĉo: kongreslando kiu certigas partoprenon de minimume unu triono de la kongresanoj.

5. Plena libereco de parolo, minimumo da policaj komplikajoj. Lando kun turismaj faciligoj koncerne vizon kaj "devizojn". Politika situacio normala. Mezaj vivkondiĉoj.

Jen proksimume la kondiĉoj laŭ kiuj ni devas elekti hodiaŭ kongresurbon. Ekzamenante la pozicion nun laŭ la nuna vivspaco de neŭtrala

Esperantismo, kiom da urboj rajte povus gastigi kongreson! Verŝajne estas, ke ni ĝis nun ne kunvenis en Kopenhago, kaj ke laŭ rotacia regulo Belgujo kaj Nederlando povus denove inviti.

Konsiderinte ĉion, oni komprenas facile, ke ne estas simpla afero decidi pri kongresurbo. Se antaŭe la propono estis granda, ebliganta elekton, nun ni devas serĉi por trovi taŭgan kongresurbon. Tion atentante la kritikantoj kaj juĝu kompreneme. Neniu hezitu veni al la bavara ĉefurbo. Ni estos kore bonvenaj!

Hans Jakob :

Estontaj kongreslokoj !

Liberaj pensoj de kongresano

LA 36-a kongreso okazos en Munkeno, 18 jarojn post Kolonjo (1933). En tiu ĉi interspaco de du kongresoj ŝanĝiĝis la mondo ĝisfunde. Disfalas regnoj, ruiniĝis landoj kaj popoloj, sed spite de ĉio tio nia movado *ekzistas*. Se ni pripensas kiom da interesaj kaj valoraj penadoj malaperis, ni ne havas eĉ la plej etan kaŭzon por plendo. Signon de nia idea forto ni povas vidi en niaj kongresoj, kiuj malgraŭ foresto de gravaj landoj, sekve de politikaj kaŭzoj, faras imponan impreson.

El diversaj korespondaĵoj ricevitaj montriĝas, ke iuj samideanoj ne estas kontentaj pri la kongresloko nunjara. Malbona kaj malĝojiga sperto el la pasinteco respeguliĝas en ĉi tiuj esprimoj de sento. Ni jam parolis pri tio en pasinta numero de nia revuo, ke estas eksterordinara fakto, ke ses jarojn post la batalfino, ree okazas kongreso de Esperanto en lando, kiu pleje persekutis nian movadon. Utilas konigi kelkajn elementajn verojn por komprenigi la elekton de la kongresurbo.

La Komitato de U.E.A. troviĝas antaŭ problemo: kie ni kongresu estontece? La kvalitoj de kongresurbo esperantista estas tre diversaj kaj nur malmultaj urboj en Eŭropo posedas ilin. Pasintjare en Parizo invitis la kongreson por 1951 *registaro regna* kaj la *Urbestro*. La ĉefa kondiĉo estis plenumita per tio. Ankaŭ la ceteraj kondiĉoj ekzistis,

kaj ĉar neniu alia urbo prezentis samajn favorojn, la Estraro de U.E.A. akceptis. Tio nun ne volas diri, ke nia memoro pri la pasinteco suferas. Tamen ĉion konsiderinte, ni diras, ke iuj devas iam komenci repreni la rilatojn kun la anoj de lando, kiu ludis gravan rolon kaj *ree ludos ĝin*. Aliflanke la germanaj Esperantistoj je granda plimulto sin detenis de agoj kontraŭaj al la homrajtoj; ili restis fidelaj al niaj ideoj kaj idealoj.

Por 1952 la Estraro de U.E.A. akceptis inviton de la norvegaj Esperantistoj al **Oslo**. Tiu ĉi urbo prezentas la kvalitojn postulatajn de Esperanto-kongreso, kaj cetere ni ne antaŭe kunvenis en Norvegujo.

Utilas koni kelkajn el la kondiĉoj por kongresurbo. Necesas:

1. Bone organizita Esperanto-movado, nombro da bonaj gesamideanoj, pretaj kaj kapablaj helpi libervole je la organizo.

2. Urbo turisma, t.e. kun nombro da bonaj hoteloj kaj funkcia servo por loĝado ĉe familioj.

3. Oficiala subteno diversforma. Ekzisto de oportunaj kaj konvenaj lokoj, ne tro dise situantaj por kunvenoj. Universitato por la sciencaj prelegoj.

4. Geografia kondiĉo: ne situanta je la periferio de Eŭropo; kun proksimeco de landoj, kie Esperanto floras kaj de kie atentinda alfluo de

daŭrigo sur p. 132.

La prelegvojaĝo de Prof. Lapenna

signifas novan grandan sukceson de U.E.A.

sur kampo de la lingva disvastigo

DE jaro al jaro U.E.A. pliampleksigas kaj plibonigas sian aktivecon. Post la organiza pliflortigo, sekvis la altigo de la nivelo de niaj kongresoj, la aktivigo kaj helpo al diversaj fakaj asocioj, la plibonigo de la oficiala organo, la kontaktoj kun diversaj internaciaj organizaĵoj kaj organismoj, antaŭ ĉio kun UNESKO, la klopodoj enkonduki Esperanton en la lernejon k.t.p. Ankaŭ sur la kampo de disvastigo de la lingvo U.E.A. montris, precipe en la lastaj du jaroj, seriozajn pozitivajn rezultojn. Prof. D-ro Ivo Lapenna, Estrarano de U.E.A. pri Kongresoj, disvastigo de Esperanto kaj juraj demandoj, prezentis al la Estraro detalan raporton pri la laboro de la fako ekde la pasinta U.K. en Parizo. En tiu raporto gravan lokon okupas la prelegvojaĝoj tra diversaj landoj. Ne povante publikigi la tutan raporton, ni mencias nur parton de la konkludaj rezultoj :

Daŭro de la vojaĝo : 13/I–29/III, 1951.

Vizititaj urboj : Roma, Milano, Torino, Cannes, Nice, Vallauris, Marseille, Toulon, Montpellier, Versailles, Paris, Arras, Brugge, Bruxelles, Antwerpen, Amsterdam, Leiden, Haarlem, Leeuwarden, Groningen, Eindhoven, Utrecht, Arnhem, den Haag, Rotterdam, Dordrecht. Krome D-ro Lapenna kontaktis la esperantistojn en Como

kaj Firenze en Italujo. En la Londona Klubo okazis aparta prelego por la membroj.

Prelegoj : Entute okazis : en Italujo 26 prelegoj kaj paroladoj en itala aŭ Esperanta lingvoj; en Francujo 8 paroladoj kaj 2 prelegoj; en Belgujo kaj Nederlando 28 prelegoj kaj 14 paroladoj. La nombro de ĉeestantoj variis inter 30 kaj 450 (Amsterdam) tiel ke entute aŭskultis la prelegojn kaj paroladojn ĉ. 5.000 personoj. Okazis unu radio-prelego (Romo) kaj unu radio-intervjuo (Hilversum).

Artikoloj kaj informoj : En diversaj italaj, francaj kaj nederlandaj gazetoj Prof. Lapenna mem aperigis 10 artikolojn pri la Internacia Lingvo. Krome okazis 11 intervjuoj kun kvindek da ĵurnalistoj, precipe en Nederlando. La rezulto estis ĉ. 80 tre favoraj artikoloj pri Esperanto kaj pri ĝia rolo. En kunligiteco kun la vojaĝo aperis ankaŭ pli ol 100 diversaj informoj en la taggazetoj. La eldonkvanto de ĉiuj ĉi gazetoj estas pluraj milionoj da ekzempleroj.

Personaj kontaktoj : Kiel la pasintan jaron, ankaŭ ĉi-foje prof. Lapenna havis la okazon kontakti plurajn gravajn personojn, precipe profesor-ojn, ĵurnalistojn, verkistojn, direktorojn de lernejoj k.t.p. Krome, en ĉiu vizitita lando kaj loko li havis kunsidojn kun la gvidantoj de nia movado.

daŭrigo malsupre de p. 136.



Tra la Mondo Esperantista



Belgujo

Belga Kongreso : La 35-a Belga Kongreso de Esperanto, organizita de Reĝa Belga Ligo Esperantista, okazos en Bruselo 12-14 majo, 1951 (Pentekosto). Interesa kaj diversenhava programo estas aranĝita, kun surpriz-ekskurso "Per tramo tra la bela Brabanto". Ĉiujn informojn ĉe : R.B.L.E., 19 av. Montjoie, Uccle-Bruxelles.

Danlando

Morala Rearmado kaj Esperanto : La unua grupo de *Morala Rearmado* (mondampleksa movado por la paco) kiu alprenis Esperanton troviĝas en Köge, Danlando. Tiu grupo celas propagandi en la rondoj de tiu movado la Internacian Lingvon, kaj petas, ke samideanoj, membroj de la movado, simile klopodu en sia loko. La grupo anoncas, ke baldaŭ estos disponeblaj informoj en Esperanto. Detalojn ĉe : P. Lendorff, D. de U.E.A. en Köge.

Instruistoj

Demandaro : Konforme al decidoj faritaj en la Pariza U.K., la internacia fakasocio de la instruistoj Esperantistaj kunlabore kun U.E.A. dissendis demandaron al ĉiuj konataj samideanoj en tiu fako, kun la celo fari statistikon pri la amplekso kaj detaloj de instruado de Esperanto en lernejoj. Informpetoj kaj detaloj ĉe : F-ino V. C. Nixon, 138 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Anglujo.

Britujo

Paska Lernejo de Instruistoj : Unusemajna paska seminario de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj okazis en Folkestone 24-31 marto. Partoprenis 20 britaj geinstruistoj kaj 4 francaj. La afero estis bone organizita. La anoj kunvenis matene por pridiskuti instruistajn aŭ lingvistajn temojn, kaj vespere por formi plezuran societon aŭ por aŭskulti prelegon. Ĉerpante el siaj propraj spertoj, S-ro Deguilly raportis pri la diferencoj inter lernejaj sistemoj en Francujo kaj en Anglujo, kaj S-ro Goodes raportis pri la vivo en Argentino. Oni faris ekskursojn al la katedralo de Canterbury, la kastelo de Dover, kaj la pitoreska havenurbo Rye. Ĉiu ano kunportis po du libroj por formi bibliotekon kaj antaŭe devis verki originalan verketon. Tio rimarkinde helpis al la sukceso de la seminario.

Nederlando

Kvardekjara jubileo : La Asocio de Laboristaj Esperantistoj "Fidu la Estontecon" (F.L.E.) en la regiono de la nederlanda lingvo festas sian 40-jaran ekziston. Pro tio la nunjara F.L.E.-kongreso okazinta je Pasko en Amsterdam, havis la karakteron de festo. Krom la kutimaj tagordaj pritraktoj okazis interfratiĝa kunveno kaj festa koncerto. Krome aperis kiel jubilea eldono Esperanta traduko de aktuala teatraĵo *La mondo ne havas atendejon*, kiu rikoltis jam grandan sukceson en pluraj urboj diverslandaj.

La agado de F.L.E. estis ampleksa kaj multflanka. Ĝi iniciatis kaj stimulis la kunagadon de la kvar nederlandaj asocioj en la Nederlanda Centra Komitato Esperantista, kaj la starigon de komuna ekzamena komitato. Ĝi prizorgis multajn elsendojn pri Esperanto, disaŭdigitajn de V.A.R.A. (Laborista Radio-Asocio). Ĝi eldonis lernolibrojn (pli ol 50 mil ekz.) kaj plurajn verkojn. Ĝiaj Libroservo kaj Literatura Komitato (por lingvo-kontrolo de eldonotaj manuskriptoj) akiris merititan reputacion.

Norvegujo

Eksterlandanaj geinstruistoj : En Norvegujo estis bona kursaktiveco dum la pasinta vintro. N.E.L. dungis tri eksterlandanojn—S-inon Haudebine, D-ron Mildwurf kaj S-ron T. Morariu. S-ino Haudebine gvidis kursojn en Oslo, Drammen, Trondheim, Morten, Moss, Kristiansand kaj Mandal. D-ro Mildwurf instruis en Haugesund, Sauda, Stavanger, Sandnes kaj Kongsberg. S-ro Morariu fervore agadis en Narvik, Tromsø, Bodø kaj Harstad. Krom tio nun ekzistas fako de Esperanto en la “Senpaga Instruado de la Studentoj”, vesperlernejo aranĝata kun subvencio de ŝtato kaj komunumo.

Ordenoj : N.E.L. fondis ordenon kun diversaj klasoj per kiu honori enlandajn samideanojn, kiuj kontribuis al la progresigo de la movado en Norvegujo.

Konkurso : N.E.L. aranĝas intersiaj kluboj konkurson similan al tiu de U.E.A. La kvotoj kaj poentoj estas kalkulataj sammaniere. Per tio oni esperas plivigli la agadon de la grupoj.

Radio : Okaze de la 40-jara jubileo de N.E.L. ĉefkuracisto Leif Sire estis intervjuita, en la Norvega Regna Radio, de la loka radiosekretario, Ernst Westerheim, ambaŭ ekskursanoj de T. Morariu. D-ro Sire rekomendis interalie la enkondukon de Esperanto en la popolajn lernejojn.

Svedlando

Internacia ferio : Klubo Esperantista de Skövde aranĝas internacian ferio-semajnon 22-28 julio 1951. La programo donos bonajn okazojn por migrado, banado, ekskursoj, vizitoj al industrientreprenoj k.s. Petu detalan prospekton de : Skövde Esperantklubb, Björkvägen 7, Skövde Svedlando.

Esperanto-Komerca Servo

Por enkonduki Esperanton en la internacian komercon “Esperanto-Komerca Servo” provas starigi rondon el seriozaj kaj taŭgaj korespondantoj speciale lokitaj por komerci kun ĉiuj landoj. Oni vokas al Esperantistoj, kiuj rekte aŭ nerekte havas intereson pri tiu fako. Ĉi tiu alvoko estas direktata precipe al eksportistoj, importistoj, transitistoj, reklamistoj, makleristoj, industriistoj. Informojn ĉe : Marcel Bosc (Del. de U.E.A.), 98 rue Casimir-Delavigne, LE HAVRE, Francujo.

de p. 134

La prelegvojaĝo estis organizita de U.E.A. kaj de la koncernaj landaj asocioj. La diversaj aranĝoj estis plej bone organizitaj en Belgujo kaj en Nederlando. Tial ankaŭ la rezultoj de la vojaĝo plej efike sentiĝos en tiuj du landoj. Tamen, ankaŭ la vizito al kelkaj gravaj centroj de Italujo kaj Francujo tute certe ne restos seneŝa.

Y. M. Canty :


La Maorioj

Malaperanta popolo

LA indiĝeno efektive uzas la vorton *Maori* adjektive. Oni diras *la maori popolo*, *maori homo*, sed ne nomas la individuon *maori*; tamen la ĝenerala uzado de la vorto *maori* de la Eŭropano en Novzelando, pro koncizo, estas oportuna.

Skribante pri la indiĝeno, oni devas kompreneble priskribi la iamajn morojn de antaŭ kaj dum la 19a jarcento. La rezulto de kontakto kun la Eŭropano tiel ŝanĝis la indiĝenon, ke li fariĝis parte antikva, parte moderna homo.

Kelkaj kutimoj restas ĝis nun. Ĉiam oni uzas la saluton *Hongi* (kunpremado de nazoj) kiel bazon de maoria socia vivo. Ĉe Rotorua, populara turisma centro, la vizitanto povas trovi interesa la bolantajn lagojn, kie la maoriaj virinoj kuiras la manĝaĵojn, kiel antaŭ multaj jaroj. Eŭropanoj, kiuj ĉeestas la grandajn festojn, aprobas la bonguston de la nuntempa manĝaĵo kuirita laŭ pratempa metodo. La bakforno konsistas el truo fosita en la tero, kie brulegas fajro de seka ligno, sur kiu kuŝas nombro da grandaj ŝtonoj. Kiam la ŝtonoj varmegiĝis oni flankenmetas ilin per krudaj bastonoj. Elpreninte la cindrojn el la truo, kaj remetinte la varmegajn ŝtonojn, oni kuŝigas unu super la alia verdfoliojn, tuberojn, radikojn, kaj sur tiuj fiŝojn kaj viandon k.s., volvitajn en grandfolioj, kaj ankoraŭ verdfoliojn. Fine sur la tuton oni verŝas akvon ĝis la tuto estas tramalsekigita. Plejeble



Tipo de Maorio

rapide la truo estas kovrata per malsekaj matoj kaj elfosita tero por malebligi la eskapon de vaporo. Post unu-du horoj la nutraĵo estas kuirita.

La naturo ne estis ŝparema al sia malhelkolora popolo en la sudpacifikaj insuloj, sed la pratempa nutraĵo devis esti akirata per diligenta laboro. Krom la kaptita nutraĵo konsistanta el birdoj, ovoj, marfiŝoj, riverfiŝoj, moluskoj, angiloj, ratoj kaj hundoj, ankaŭ beroj, radikoj, palmoj, dolĉterpomoj, k.s. estis kolektitaj kaj sekigitaj por la vintra bezono.

*Indiĝena arto*

En multaj landoj la indiĝenoj ornamis la korpon per tatuado, sed la Novzelandano estis elstara pro la tatuita vizaĝo. Virojn ne tiel ornamitajn la virinoj malŝatis. Ĉe la virinoj tamen nur precipe la lipoj kaj mentono estis tatuataj. Kiel oni povas imagi, la operacio tre dolorigis. La *tohunga* (sorĉisto aŭ pastro) per ĉizileto el balenosto, kaj koloraĵo faris la taskon. Unue li skizis la desegnon per lignokarbo. Lerte kaj perfekte li desegnis simile ambaŭ flankojn de la vizaĝo. Trempinte la ĉizilon en la koloraĵon, li batis ĝin en la karnon per bastono. Neeblis kompletigi la operacion je unu fojo pro inflamiĝo de la delikata karno de la vizaĝo. Ofte okazis, ke dum la procedo—kiu iafoje komenciĝis je seksmaturiĝo kaj daŭris jarojn—kelkaj homoj devis

perforte teni la kompatindan viktimon !

Antaŭe la maorioj longe vivis, kaj mortis precipe pro milito kaj maljuneco. La pursango kaj sana okupado nenecesigis multe da kuracado. Oni rakontas, ke malsanulojn oni kutime kondukis al la rivero, kie la *tohunga* enakvigis ilin kaj post ceremonio el kriegaj alvokoj kaj preĝoj la paciento tute resaniĝis. Evidente la akvo kaj preĝoj forlavis la malsanon !

Pro la kanibalismo la maorioj bone konis la homan anatomion kaj sciis praktiki krudan kirurgion. Kompreneble, rilate al doloro, la paciento devis esti iom stoika !

La maorio estis kuraĝa, fortvola, gastigema, kaj bonfarema al virinoj kaj infanoj. Aliflanke li estis fiera, venĝema kaj — laŭ nia normo — kverelema (kvankam laŭ raportoj pri okazaĵoj en atakitaj urboj dum la milito, li ne estis pli kruela ol la moderna “civilizita” homo !). Laŭkutime ĝentila, la maorio neniam kontraŭdiris vizitanton, eĉ kiam li kredis la diron malĝusta. Enirante vilaĝon, gasto, antaŭ ol saluti konatojn, atendis ĝis la gastiganto petis lin eksidi. Por montri respekton la tribĉefo humile sidis antaŭ la gasto, kiu elironte ricevis donacojn el nutraĵoj.

Kiel la gejunuloj de la tuta mondo, ankaŭ la maoriaj gejunuloj amas la dancadon. Tre muzikema, la maorio posedas precizan ritmon kaj takton. Ilia dancado, esence de la pozo, okazas amase, ne kiel ĉe Eŭropanoj kiuj dancas duope el ambaŭ seksoj. La pratempe konata militdanco, je kiu densaj vicoj de militistoj kun levitaj bataliloj saltegis jen dekstren jen maldekstren, estas impona

spektaklo kaj samtempe la kriegoj de la fervorega ĥoro estas iom timiga por la rigardanto. Neforgesebla memoraĵo.

Rilate al gefeoj la kredo similas tiun de Eŭropo. La etuloj, kiuj havas palan haŭton kaj flavan hararon, loĝas inter la floroj kaj arbustoj kaj estas nomitaj *Pake-Pakeĥa*. Tial, kiam la blankuloj venis en Novzelandon oni nomis ilin *Pakeĥa*.

Por havigi al si la necesajn aĵojn de la vivo la praa maorio akiris saĝon kaj prudenton, sed la misiistoj kiuj alvenis en Novzelando detruis la lignajn skulptaĵojn, kiujn ili kredis idoloj. Ili krome malhelpis la praktikon de indiĝenaj arto kaj

kulturo. Antaŭ nelonge tamen nova kaj freŝa vervo eniris la metodojn de instruado de la gejunuloj. Reviviĝo de la maoria teksarto, de la ligno-skulptado kaj instruado de la indiĝena lingvo sekvigis renaskiĝon de la maoriaj kulturo kaj tradicio. La *Pakeĥa* (blankuloj) faras sian eblon kolekti kaj konservi la historion kaj poezian folkloron de la maoria popolo. Ne ekzistas *kolorbaro* en Novzelando, kaj politike, socie kaj egalrajte la maorioj vivas flanke de la *Pakeĥa*.

(La redakcio volas esprimi sian dankon al la fako por turismo Tourist and Health Resorts Dept. en Novzelando pro la fotoj donitaj por illustri la ĉi-supran artikolon).



Hejma metio

Brendon Clark :

Donu al mi tempon

*Donu al mi tempon, ĉionpova Dio,
Por la revon de l'juneco rememori :
Por inspiri min per freŝa energio,
Por elpensi kaj labori—*

Aŭ, perdinte ĉiun fidon, novan por ricevi ;

Por la revon realigi, kaj denove revii.

*Donu al mi tempon, ĉionpova Dio,
Por la virtojn de la homoj elproklami ;
Por ĝiskore koni min, sen iluzio ;
Por la malamikon ami.*

*Antaŭ tiu pordo kiu kaŝas la eternon,
Tempon al mi donu—por lumigi la lucernon.*

Averto (post kverelo)

Ne kredi nun al mia koro,
Estus ĉion; mi avertas, nei !
Saĝe, kara, diras la memoro,
Ĝuste kion kredi kaj obei.

Brendon Clark :

La Vojaĝo de la Maorioj

Al Nov-Zelando

Laŭ la plej fidindaj legendoj de la Maorioj mem (kiuj, manke de skribarto, lernis parkere sian historion), Nov-Zelando estis unue trovita je proksimume 950 p.K. de la lerta navigisto Kupe, kiu revenis al la fabela lando Hawaiiki (eble Raratonga), kun interesa rakonto pri bela lando multe pli sude. Kupe mortis, du jarcentoj pasis, kaj la popolo preskaŭ forgesis lian eltrovaĵon. Tiam ekflagris intertribaj kvereloj; la sango fluis, kaj fine iu Ngahue, memorante pri la lando, kiun trovis Kupe, aranĝis elmigron de Hawaiiki per ok grandaj, duoblaj kanotoj; kaj eble mil gehomoj postlasis la hejmlandon kaj velveturis tra ŝtormoj kaj aliaj danĝeroj trans dumil mejlojn da maro, sen markartoj aŭ kompasoj. Foje la vento antaŭenblovis ilin, per la altaj, teksitaj veloj el kano; foje ili padelis. Estas mirinda atesto pri la lerteco de maoria navigado, ke ĉiuj ok kanotoj atingis Nov-Zelandon. Ĉi tiuj famaj kanotoj estis nomataj: Arawa, Matatua, Tainui, Takitumu, Kurahaupo, Tokomaru, Matawhaorua, kaj Aotea.

Ĉe la postaĵo de ĉiu kanoto staris alta, ĉizita stango; ĉe la antaŭaĵo, 'ligna, spitema vizaĝo' kun orientaj okuloj el perlamoto, kaj nekredeble longa kaj insulta lango.

En la tropikaj regionoj, la krepusko daŭras tre mallonge, kaj kompreneble la Maorioj rimarkis la diferencon, kiam ili venis al Nov-Zelando. Unu traduko de la maoria nomo por Nov-Zelando—Ao-te-a-roa—estas 'Lando de longa krepusko'. Aliaj tradukoj estas, 'Lando de la longa, blanka, nuboj' kaj 'Lando de Matenruĝo'.

La Aŭtoro.

Super la rando de l' maro leviĝas denove la vento,
 Forta spirado de Rangi, prapatro de tero kaj gento;
 Dio pro kies ordono la suno turmentas skarlate,
 Aŭ nigra nubaro aperas, el fonto infera vokate . . .
 Kaj antaŭ la dia spirego forsaltas la grandaj kanotoj,
 Kiel de faŭko balena terure forsagas la sprotoj.
 Rapide ruliĝas la ondoj, konante la dian koleron,
 Kaj levas la pezajn kanotojn alte en bruan aeron . . .
 Ĉie ni vidas la maron, kaj ĉiam ni tamen soifas.
 Kiom al niaj mortantoj tiom da akvo signifas?
 Vane kantadis sorĉistoj, vane ni petis la diojn;
 Sed tiuj, anstataŭ la pluvon, nur sendis al ni agoniojn.
 Malsupren, malsupren ni siblas, kaj supren altiĝas la ondo;
 Foriĝas la blua amplekso, ĉirkaŭas nin nova marmondo:
 Mondo el verdaj vidaĵoj, el ombroj purpure minacaj,
 Inter la maraj deklivoj, inter gigantoj malpacaj.
 Kaj ĉe l' antaŭaĵo la akvo, sub ligna vizaĝo spitema,
 Ŝaumas, ŝiriĝas kaj ŝmacas kontraŭ kanoto traprema,
 Kaj sternas laŭlonge de l' flanko sibladon de salaj bobeloj,
 Formatan laŭ granda lancpinto per iaj sorĉistaj tabeloj.
 Fariĝas ni mem la tenilo—Ĉu bona, ĉu mala aŭguro?
 Ne grave; nur vantas la signoj: sufiĉu la nuna teruro.
 Jam, multaj el niaj mortintoj, animoj sen pluaj konsternoj,
 Forvagas kun maraj feinoj, forgesas en verdaj kavernoj
 Por kiuj la lumo devenas el tiu fontano fajrera
 Kiun kirleto ekvekas, en maro dum nokto somera . . .

Aliaj, soife frenezaj, la maron venenan enĝlutis
Kaj tuj kun kaŝitaj koboldoj la rajton ĉeesti disputis.
Venkite de tiaj demonoj, la homoj en ondojn sin ĵetis—
El la fidinda kanoto, kiun ni pene kunmetis
Sur grundo de fora Hawaiki, per arto zorgema kaj sperta,
El arboj malmolaj formita, laŭ scio provita kaj lerta
Aliaj, silente kuŝantaj, senvorte kadavroj fariĝis
Kiam espero elmortis kaj vivo jam tro amariĝis.
Kaj jen iu tia la buŝon malfermas pro ŝajna ekmiro,
Aŭ kvazaŭ insiste flustriĝus la lasta, kaŝita, ŝopiro.
Kaj ties okuloj elstaras, sen vido en lumo abunda,
Kiel okuloj de monstro tiritaj el maro profunda :
Okuloj per kiuj li vidis la palmojn kliniĝi pro vento,
Kaj larmis sekretan 'adiaŭ' dum ĉiu vespera silento,
Rigardis la sunon tagmeze, naĝantan en kupra ĉielo,
Sopiris al nokta trankvilo, kaj ĝia arĝenta mantelo ;
Rimarkis la nuban averton, observis la velan ŝveladon,
Komprenis la signojn de l' dioj, kaj spitis la dian paradon ;
Kvazaŭ ekflagris subite, aŭdinte diraĵon malflatan,
Aŭ ardis pro forta feliĉo, frontante vizaĝon amatan ;
Okuloj per kiuj tra vivo li gajnis spertecon kaj lernon,
Okuloj per kiuj en morto li konos solecan eternon
Kaj sub la ŝrumpinta kovraĵo, sub haŭto velkinta, sen karno,
Similas la ripoj maldikaj al domo de kiu la garno
El pajlo, argilo kaj ligno, laŭgrade nuliĝis pro ŝtormo,
Kaj sole la nuda fostaro atestas pri pli bela formo.
La koro finfine dormadas ; forflugis la forta animo ;
Silentaj la kantoj kaj fabloj ; troviĝas al ĉio la limo ;
Cetere, la laca spirito sopiras al nura ripozo :
Post vento, trankvilo; post tago la nokto; kaj morto post marfuriozo . . .
La povo ellevi la korpojn jam mankas al ni la ceteraj
Kaj niaj kadavraĵ kunuloj kontraŭas al pensoj esperaj ;
Do restu laŭvole, mortintoj : rigardu la velon ŝiritan,
Observu la stangon rompotan, la ŝnuron tro streĉe tiritan,
La lignon putrintan, la mastan kurbiĝon, la karnan malpuron,
Mordantan malsaton, senfinan soifon, frenezan teruron.
Rigardu, rigardu, mortintoj !—Atentu pri tiu junulo,
Kiun plorantan supere, spegulas mortinta okulo.
Aŭskultu filinan ĝemadon, aŭskultu edzinan lamenton !
Tamen la nigraj okuloj montradas nur indiferenton.
Tie kuŝadu, amikoj, ruliĝu de flanko al flanko
En akvo haladza kaj naŭza, sur ŝlima kanota fundplanko ;
Kaj kiam la maro maldolĉa ŝancelos la lignan fokenon,
Turniĝu denove, amikoj, por pruvi kadavran senĝenon.
Vi pravas ! Pli saĝe, dormadi en pacaj, silentaj markavoj.
Ol esti murditaj avare, en landoj de niaj praavoj.
Pli bona la lando de Kupe, pli bona la tero de l' sudo—

Sed kie la lando de Kupe, kaj kiom pli longa la ludo ?
 Do diru al diaj kunuloj, ke iom lacigas la moko,
 Ke inter la jamaj mortintoj troviĝas ankoraŭ kuŝlokoj.
 Kaj nun la palpebroj peziĝas, pro vento kaj suno kaj salo,
 Kaj blinde sopiras al vido de arbo, sablejo, koralo ;
 La buŝo sekiĝas dolore, la voĉo nur flustras obtuze,
 Kaj inter deliro kaj revo la menso alternas konfuze ;
 Ĉar nun la sanplena forteco fariĝas malforto infana,
 Kaj ĉian iaman homecon forrabis malsato tirana,
 Jam ne kiel viroj ni staras, sed kvazaŭ surventraj lacertoj
 Enrampas ombraĵon ĝis nokto, forlasas ĝin kiel vespertoj.
 Jen ! Kvankam la ŝtormojn ni timis, almenaŭ ni kaptis da pluvo,
 Ĉar morto kaj vivo troviĝas egale en ĉiu diluvo.
 Neniom da akvo ektuŝis de antaŭ tro longe la langon :
 Volonte ni murdus amikon, baraktus por trinki la sangon,
 Sed kiu la sangon posedas, kaj taŭgas por tia ofico ?
 Nur fidi la diojn ni povas, drivante laŭ ties kaprico
 Kaj supren-malsupren vagante, perditaj, rezignaj, sen celo,
 Observi la pinton de l' masto kurbiri trans moka ĉielo . . .
 Tedas la bluo kaj blanko de tiu ĉi mondo de l' maro ;
 Kiam denove ni vidos la verdon de granda arbaro ?
 La brunon de l' arba trunkego, la grundon, la brilan agrablon
 De fuko malseka sub ŝaumo, vomita de l' ondoj sur sablon ?
 Arĝenton de altaj filikoj, de ruĝa papago ekbrilon,
 Purpuron de foraj montetoj, la nigran, sintordan angilon ?
 Nur tro malrapide alvenas la sendoloriga mortado,
 Kiel ĉi tie la nokto, post longa krepuska laŭgrado—
 Kiel la nova edzino, je kiu la edzo avidas . . .
 Edzino . . . Jen ! Mia edzino, al kies okuloj ni fidas,
 Kiel vundito sin trenas de sub la ŝirmejo ĉe l' mezo,
 Atingas la antaŭfiguron, apogas sin al la pavezo . . .
 La kapon, malklaran ombraĵon, mi vidas leviĝi kaj fali,
 Supren-malsupren ; momenton ekhalti ; transiri, spirali . . .
 Kiom la vangoj kaviĝas . . . ĉefino . . . sen propra bieno . . .
 Iam ŝi estis belega, kun arda, fiero mieno,
 Feliĉa pro siaj infanoj, aminda, juneca kaj homa ;
 Sed nun, kun kadavraĵoj konitoj ŝi ankaŭ fariĝas fantoma :
 La haroj antaŭen flirtadas, kaj kvazaŭ palpantaj minace,
 Similas la maranemonon ; kaj jen ŝi rektiĝas, kaj lace
 Ŝi levas la manon al brovo, kaj fikse la ondojn esploras,
 Kiel antaŭe milfoje ; sed tion ni ĉiuj ignoras :
 Tro ofte la nova espero fariĝis malnova ĉagreno,
 Tro ofte la sonĝon de l' nokto frakasis inkuba mateno . . .
 La brako leviĝas kaj tremas, montrante al nuba marrando,
 Kaj voĉo amata ekgrakas : "La tero ! La fino ! LA LANDO !

Originala.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

* **Naŭlingva Etimologia Leksikono** de Louis Bastien, Akademiano ; eld. The Esperanto Publishing Company ; 18.5×13cm., 315 p., bind., prezo 12ŝil. 6p., aŭfranko 6p.

Multaj Esperantistoj ĝojos revidi en taŭga bindaĵo nian solan etimologian leksikonon, kiun jam preskaŭ du generacioj konis kaj alte taksis. Ne nur la teksto estas pli klare presita, sed ankaŭ la verko estas riĉigita per multaj piednotoj pritraktantaj interalie la “ĝemelajn radikojn” pri kiuj D-ro F. I. Wiener verkis pensincitan artikolon en *Esperantologio*, vol. I, p. 98–106. Krome, en la nova eldono la rusaj vortoj estas transliteritaj—do multe pli facile utiligeblaj.

Etimologio de internacia lingvo ne havas la saman taskon kiel tiu de nacia lingvo. Nia pioniro, W. Skeat, iam starigis por la verkisto de etimologia vortaro angla kelkajn principojn sekvindajn inkluzive de la jenaj : elserĉu la plej fruan citon de la vorto en la koncerna lingvo kaj difinu precize ĝiajn formon kaj uzon ; prikonsideru la geografiajn kaj historiajn faktojn memorante, ke ekz. pruntoj devenas de reala kulturkontakto kaj ne transflugas teron kaj maron kiel migrobirdoj ; obeu la regulojn de fonetika evoluo jam formulitajn por la loko kaj tempo, kaj ne kontentiĝu ĝis vi povos klarigi ĉiun sonon en la vorto, konstati ĝian signifon en ĉiu kunteksto kaj situacio kaj observi ĉiun ŝanĝon de signifo, eĉ la plej malgrandan. Se oni agus tiel, preskaŭ

ĉiuj etimologioj senditaj de korespondantoj al la ĵurnaloj forstrekiĝus ! La tasko de la etimologo de Esperanto ne estas ĉefe historia sed kompara, ĉar Esperanto ne estiĝis senkonscie kaj senintence, sed celkonscie kaj plenintence. Do, temas pri la cito de esprimoj el la ĉefaj fontlingvoj, kiuj disponigis al Zamenhof lian materialon, prezentante similaĵojn kaj analogiajn formojn en diversaj lingvoj kaj, krome, montrante en Esperanto ĝian komunan heredaĵon de la hind-eŭropaj lingvoj. La verkisto ne citu pure hazardajn ekvivalentojn—la vortoj, kiujn li envicigas por komparo kun Esperanto, estu el historia vidpunkto vere parencaj.

Ĉu ĉi tiu verko sukcesis fari etimologion en tiu senco ? Granda parte jes. Tamen ekzistas kelkaj punktoj, al kiuj mi devas atentigi. Unue, multaj el la anglaj paraleloj estas fantomvortoj, kiuj ja troviĝas en vortaroj, sed neniam sur la lipoj de angloj, ekz. *cere*, *ferial*, *fuliginous*, *crural*, *horologe*, *podagra*, ĉiuj vortoj, kiujn plej altatakse eble konas kelkaj fanatikuloj de krucvortenigmoj. Tiaj vortoj havas nek lingvosciencan nek memorteknikan valoron. Pri kelkaj anglaj vortoj avertu en piednoto estus konsilinda, ekz. *recension*, *redaction*, *pedagogy*, kiuj por la kontinentulo estas verdire “falsaj amikoj”. Due, kelkaj etimologiaj komparoj kun anglaj vortoj estas eraraj, ekz. *boar* ne parencas kun latina *aper* ; *swoop* ne interrilatas kun germana *schweben*

“ŝvebi”, sed kun *schweifen*; *rook* de anglosaksa *hroc* devus en latina respondi al *k* (kp. *horn/cornu*) kaj ne al *f* en *frugileg-*; *culinary* devenas de latina *culina*, kiu ankaŭ donas al ni *kiln* “sekigejo”. Trie, estas vere bedaŭrinde, ke oni iom arbitre forlasis la “gramatikajn” vortojn, kies klarigo — laŭ p. III — apartenas al la gramatika morfologio. Multaj Esperantistoj estus volontaj trovi la originon ekz. de *ĉu*, *eĉ*, *nepre*, *krom*, *pri*, *po*, *ol*, k.t.p.—tiaj vortoj certe ne estas klarigitaj en aŭ per iu ajn morfologio, kiun mi konas, kaj egale certe havas hejmrajton en Esperanta vortaro.

Kompense de tiaj kritiketoj mi provos montri, kiel oni povas ekspluati la donitaĵojn de la leksikono por respondi al tiuj, kiuj riproĉas al ni (1) la kontraŭnaturan modifon de naciaj lingvoj en la formo de niaj radikoj, kaj (2) la superabundan alprenon de neokcidentaj radikoj. Pri (1) oni konstatas, ke kelkfoje ŝajne arbitra ŝanĝo estas efektive sugestita de slava formo, ekz. *kvartalo*, *poluso*, *poŝto*, *paletro*, *latuno*. Pri (2) fakte ekzistas en Esperanto kelkaj pure slavaj radikoj (*bulko*, *kolbaso*, *kaĉo*, *kreno*, *barĉo*, *prava*, *barakti*, *ĉerpi*, *kartavi*, *klopodi*), sed kelkaj gravaj radikoj estas komunaj al germana (ofte ankaŭ nederlanda kaj skandinavaj lingvoj) kaj rusa (ofte ankaŭ aliaj lingvoj de orienta Eŭropo) nome *banto*, *brovo*, *grundo*, *keglo*, *krano*, *rifo*, *ŝirmo*, *ŝnuro*, *torfo*, *vakso* kaj la verboj *celi*, *gladi*, *luli*, *ŝpruci* kaj *varbi*. Eĉ la ŝajne kontraŭnatura akcentado kelkfoje praviĝas per la akcentado de la slava vorto, ekz. *ĉe* *grifelo*, *maklero*, *rimento*.

Entute, mi kore rekomendas la verkon al ĉiu samideano, kiu volas

enprofundiĝi en la fontojn de nia lingvo. El la bano li eliros refreŝigita!

Prof. W. E. Collinson.

Esperanto-norsk ordbok: Ragnv. Rian: eld. Esperanto-forlaget A/S, Oslo, Norvegujo. 174 p., bind., prezo 15 norv. kronoj.

Tiu ĉi bonege verkita vortaro estas atendita dum pluraj jaroj en Norvegujo. Vidante ĝin oni tuj ekĝojas pro la bela aspekto kun bona papero kaj forta bindo. La mallongigoj kaj signoj estas praktike aranĝitaj kaj klaraj. La klarigoj en Esperanto kaj en la norvega lingvo estas sufiĉe detalaj. Bonega ideo aldoni norveglingvan klarigon al fremdaj malofte uzataj vortoj, tial oni ne bezonas serĉi en leksikono. Ĝi estas vere rekomendinda libro. Preserarojn mi preskaŭ ne trovis.

O.T.N.

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Gousseau. Al ges. en Thiers, Francujo, 5 feb. 1951, filino **Françoise Germaine**.

Gefianĉiĝo

Munkelt-Smith. F-ino Helga Munkelt de apud Hamburg en Germanujo kun S-ro Norman Smith, sekretario de Londona Esperanta Klubo.

Geedziĝo

Gittos-Love. F-ino G. E. Gittos kun S-ro C. G. Love en Beaufort, Mon., Britujo, 27 marto 1951.

Kruisheer-Goedhart. F-ino Miep Kruisheer kun S-ro F. Goedharten Dordrecht, Nederl. 24 apr. 1951.

Sincerajn gratulojn!



NIA FORUMO

PAROLAS LA LEGANTOJ

Pri redaktado (marta n-ro)

Mi gratulas vin pro aparte bona numero !

Pri via artikolo sur p. 72 mi tutkore konsentas ĉion, kion vi diras. Ja ekzistas sufiĉe multaj vortoj, kiuj, pro malofta apero, ŝajnas al diversaj legantoj esti "novaj", kvankam ili ekzistis dum, ofte, ne nur 20 sed eĉ 30 aŭ 40 jaroj, kaj aperas en pluraj vortaroj de longe eldonitaj. Mi ne vidas ian ĉeson de "plendoj" pri tiaj vortoj ; ĉar ĉiu nova "generacio" de lernintoj "falas en la kaptilon" pro nescio kaj/aŭ troa memfido pri siaj lingvaj akiroj !

B. Long.

En via artikolo ŝajnas al mi, ke vi rilatas eĉ tro ĝentile al la novzelanda propono, ke oni cenzuru en *Esperanto* la vorton "evento" kaj iujn aliajn vortojn, kiel "neologismojn". Prave vi demandas, ĉu "evento"—vorto ĝenerale uzata de almenaŭ dudek jaroj—estas rigardebla kiel neologismo. Efektive pri tio eĉ ne povas esti demando, ĉar neologismo laŭ la *Plena Vortaro* estas "Nova, antaŭe neuzata vorto aŭ esprimo" ; sekve "evento" simple ne estas neologismo, kaj punkto.

Pli grava estas la koneksa demando : ĉu entute oni rajtas malpermesi novajn vortojn en *Esperanto* ? Tia sugesto estas nerealisma. La lingvo ja evoluas per procezo de neologismoj kaj arkaismoj, kiel skizas la antaŭparolo de la Fundamento. Se ĉesus aperi novaj vortoj, tiam la vortaristoj—kies ĉefa tasko estas kontroli kaj registri la uzatajn vortojn—ne plu ricevus novan materialon por

kontrolado, ĉiu nova vortaro estus nur represado de la antaŭa kaj la lingvo haltus dum preterirus ĝin la vivo kaj la epoko.

Ne. Ne estas la tasko de nia organo aprobi aŭ malaprobi vortojn uzatajn de kompetentaj aŭtoroj. Sufiĉas nur certigi, ke tiaj vortoj estu komprenataj. Por tion kontroli necesas akcepti iun internacian normon. La solaj normaj vortlistoj estas (a) la Oficiala Vortaro, (b) la Plena Vortaro kaj (c) la fakvortaroj de Verax, Parnasa Gvidlibro kaj la diversaj teknikaj terminaroj eldonitaj de U.E.A. kaj aliaj. El tiuj nur la Plena Vortaro estas praktika komuna kontrolilo. Do se oni glosos ĉiun vorton, kiu ne aperas en P.V., tiam *Esperanto* plenumos praktike sian lingvan celon

Reto Rossetti.

Responde vian demandon en *Esperanto* pri neologismoj, mi estas kontraŭ la koncerna rezolucio. Mi devas konfesi, ke mi memoras la tagojn kiam strangaj vortoj ne en miaj vortaroj tre ĝenis min sed !

Mi eĉ dubas ĉu oni povas limigi redaktoron al P.V. sed ŝajne vi ne trovas tion tro ĝena. Eĉ tiel mi opinias, ke foje vortoj povas penetri, ĉar la memoro estas foje falsema kaj oni ne ĉiam havas tempon kontroli. Mi scias, ke tio ne savos kontraŭ riproĉo.

Troa uzo de neologismoj kun piednotoj ne estas bona el aspekta vidpunkto—foje pekas, laŭ mi per tio, ke la redaktoro tro piednotas siajn komentojn k.t.p.

Fundamente mi opinias, ke oni ne tro katenu redaktoron, kaj se iam estus voĉdonado tiupunkte mi certe defendus vian pozicion.

Entute mi estas tre kontenta pri *Esperanto*, kun la escepto de la enigma paĝo—sed ĉio ne povas plaĉi al ĉiu, kaj mi estas kontenta se ĝi donas plezuron al aliaj.

E. D. Durrant.

Pri via interesa artikolo mi volas diri, ke la lingvo de la revuo *Esperanto* estas ĝenerale modela, pura, klasika—kun temoj agrablaj ; pri tio mi sincere gratulas vin.

Tamen ankaŭ al mi malplaĉis la vorto “evento”. Mi scias, ke ĝi estas en la P.V. sed ĉu ĉiuj neoficialaj vortoj en tiu P.V. estas jam pravigitaj en la komuna uzado ? Al mi, Franco, “evento” ŝajnas “anglismo”. Kiu uzas ĝin krom la Angloj ?

Pri la rolo de la Redaktoro mi

konscias, ke ĝi estas delikata ; tamen lasante sufiĉan liberecon al la aŭtoroj—konsekvence utilan elastecon al la lingvo—li povas de tempo al tempo memorigi per artikoletoj kaj privataj leteroj pri la nepra neceso de simpla kaj tradicia Esperanto.

Roland Jossinet.

Delegita Servo de U.E.A.

Dum tutmonata rondvojaĝo tra Hispanujo en sept. mi spertis denove la grandegan utilecon de la U.E.A. servo kaj la senliman ĝentilecon de ĝiaj delegitoj. Ĉar mi ne scipovas la hispanan lingvon mi—kaj miaj du geakompantoj—des pli bone taksas la afablecon kaj helpemon de la delegitoj. Dank’ al ili nia restado iĝis plej alloga kaj komforta.

G. Vermandere.



Spaco bezonata por novaj libroj !

po 1^ŝ. Reduktitaj prezoj po 3 rpk.

Arboj de la Arbaro kaj Kampo—40 paĝoj—multaj ilustraĵoj—priskriboj kaj uzeblecoj de oftaj arboj en Eŭropo.

Gaja Leganto per Esperanto—56 paĝoj—ŝercoj, anekdotoj, ludoj, k.t.p. perfekta por grupoj kaj klasoj.

Londonanidoj—98 paĝoj. La faritaĵoj de Londonaj lernejoj evakuitaj al la kamparo dum la pasinta milito, originale verkita de unu el ili—D. W. Munns—tiutempe 14-jara.

Premiaj Romanetoj—96 paĝoj. La plej bonaj romanetoj ricevita en konkurso—simpla lingvo.

Po 1^ŝ. 2p. afrankite, aŭ tri respondkuponoj

Eldonitaj de : **The Esperanto Publishing Co., Ltd.**

Mendu ĉe : **U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo**

(vidu ankaŭ p. 148)

Enigma Konkurso N-ro 58

Solvojn al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenberg 28, Brussel II, Belgujo.

Bone notu la novan adreson !

Solvoj de la Konkurso N-ro 56.

N-ro 122 : Ksilografisto, Ortopedisto, Reprezentanto, Etnografisto, Agronomiisto. KOREA.

N-ro 123 : Asekuri, aspekti, aspergi, eksporti, eskorti, esprimi, estingi, importi, inspekti, instrui, kompari, kompati, kompensi, kompreni, konspiri, konstrui, konsumi, korupti, mensogi, narkoti, promeni, promesi, rakonti.

N-ro 124 : La ekzistado de lingvo internacia, per kiu povus komprenigadi inter si la homoj de ĉiuj landoj kaj popoloj, alportus al la homaro grandegan utilon. *Orig. Verk.* 284, *Fund. Krest.* 279.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 54-a konkurso : S-ro R. Launay (Franc.) 157 p., S-ro E. Schmitt (Franc.) 148 p., S-ro L. Vitali (Ital.) 148 p.

Enigmo N-ro 128 : 1. nacio+ol ; 2. oni+tial ; 3. pro+milo ; 4. kalo+oro ; 5. dek+suno ; 6. veni+dio ; 7. dek+tiri ; 8. pia+kara ; 9. brano+ja ; 10. pato+kio ; 11. trie+ono ; 12. tro+kodo ; 13. rego+nei ; 14. sep+limo ; 15. oka+trie ; 16. sur+mito ; 17. sep+miro ; 18. rodo+kio ; 19. krom+eta ; 20. maso+kio ; 21. nek+nano ; 22. sako+plu ; 23. tia+peto ; 24. kiso+por ; 25. roto+nia ; 26. pesi+dek ; 27. kano+tre ; 28. mal+fino ; 29. roto+aro. El la sep literoj de ĉiu paro da vortoj faru novan vorton. La unuaj literoj de la trovitaj vortoj devas formi esprimon el la *Proverbaro* de D-ro Zamenhof.

Enigmo N-ro 129 : Ŝercdemandoj. 1. Kiu "pafilo" estas parto de "alta

herbo" ? Al la sama demando vi serĉu respondojn por la sekvantaj paroj da klarigoj. 2. ludilo—festo (Kiu ludilo . . . k.t.p.). 3. uzata por fari ŝtofon—ŝlimo ; 4. frandaĵo—mortigilo ; 5. entenas pupon—birdo ; 6. ĉambrego—necesa por la manĝaĵo ; 7. alta monumento—korpoparto 8. protektanto — parenco ; 9. valora papero—vitra kloŝeto ; 10. muzikilo—floro ; 11. korpoparto—aroma vegetaĵo ; 12. frukto—muzikilo ; 13. subdistrikto—signo de ĝojo ; 14. ornamaĵo—amaraĵo ; 15. speco de koko—korpoparto ; 16. vento—dent-skrapululo ; 17. konstrumaterialo—legomo ; 18. nobela titolo—malhelpo ; 19. nombro—grenspeco ; 20. frukto—akvoetendaĵo.



"Ne ĝenu min nun, Paŭlo !"

(Ni esprimas nian dankon al Eldona Societo Esperanto pro la afabla permeso reprodukti ĉi tiun spritaĵon kiel ankaŭ pro prunto de la patrico.—RED.)

LA “EPOKO” LIBROJ

Serio de interesaj romanoj k.s. por la distra horo

afrankite

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie (“Etulo”). 1ŝ. 8p.
Okazas murdo, sed feliĉe Hercule Poirot estas jam (aŭ 5 rpk)
surloke por solvi la misteron.
2. **La Knaboj de Paŭlo-strato.** Francisko Molnár (L. Spierer). 1ŝ. 8p.
Budapeŝtaj gimnazianoj—antaŭ 1900—heroe batalas (aŭ 5 rpk)
unu grupo kontraŭ alia pro belega ludotereno.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse (G. Badash). 1ŝ. 8p.
Fantaziaĵo pri insula princo, kiu loĝas en Londono. (aŭ 5 rpk)
4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells (E. W. Amos). 1ŝ. 8p.
Viro antaŭeniras laŭ tempo kaj (aŭ 5 rpk)
trovas du homajn rasojn.
5. **Princino de Marso.** E. R. Burroughs (K. R. Sturmer). 1ŝ. 8p.
Usona oficiro spertas multajn aventurojn sur Marso. (aŭ 5 rpk)
6. **Colomba.** Prosper Mérimée (J. Beau). Romano pri 1ŝ. 8p.
Korsa feŭdo. (aŭ 5 rpk)
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlanyi (L. Spierer). Inĝeniero 3ŝ. 3p.
venĝe promesas sep vangofrapojn al riĉulo. (aŭ 10 rpk)
8. **La Virineto en Bluo.** Originale verkita de Mason 3ŝ. 3p.
Stuttard. Diversspecaj noveloj; amuzaj kaj seriozaj. (aŭ 10 rpk)
9. **Brulanta Sekreto.** Stefan Zweig (K. R. kaj P. E. 4ŝ.
Schwerin). Streĉaj noveloj pri la homa psiko. (aŭ 12 rpk)
10. **Kiso de la Reĝino.** I. F. Naĵivin (D. Staritsky). Aven- 4ŝ.
turoj en Kongo Belga. (aŭ 12 rpk)

GRAVA AVERTO. Pro la nuna tre alta kosto de bindado (eĉ de broŝurita libro) ni devos plialtigi la prezojn de la supraj libroj. Post la 31a de Julio, 1951, la prezoj estos—

N-ro 1 ĝis 6 po 2ŝ. 3p. aŭ 7 rpk., afrankite.

N-ro 7 ĝis 10 po 4ŝ. 3p. aŭ 13 rpk., afrankite.

Eldonitaj de

The Esperanto Publishing Co. Ltd., Anglujo.

Mendu ĉe enlanda libroservo

aŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Anglujo.

Vidu ankaŭ paĝon 146.

Niaj kunlaborantoj

**Jorge Anibal de Saldanha Carreira, Akademiano,
Komitatano de U.E.A., ĈD en Portugalujo**

S-RO SALDANHA CARREIRA naskiĝis en 1887, do li estas samaĝa kiel Esperanto, al kiu li aliĝis en 1913. Tre baldaŭ entuziasmiĝinte por la lingvo, li sukcesis ricevi de Generalo Norton de Matos en la unua mondmilito la rajton uzi la Esperantan emblemon, kaj pretendas esti la unua oficiro en la mondo, kun tiu privilegio.

En 1919 li estis anoncita en la Registara Tagĵurnalo kiel oficiala instruisto de Esperanto en la Komerca Lernejo de Ferreira Borges kie okazis oficialaj ekzamenoj. Kiel kontribuanto al multaj internaciaj gazetoj li estas vaste konata, kiel ankaŭ al enlandaj gazetoj kie li senĉese pledas por la internacilingva ideo. En 1930 Prof. Cart proponis lin L.K.-ano kaj nun li estas ano de la Akademio de Esperanto. Kiuj legis la artikolojn de nia portugala samideano konscias pri neŝanceblaj fido kaj kredo pri la fina triumfo de nia afero. Ĉe li oni konas la fervoran pledon por Esperanto kiel amasmovado, popollingvo.

Rigardante la bildon de S-ro Saldanha Carreira la nescia povus preteratenti sub la patriarka ekstero la firman volon kaj la persiston, kiuj karakterizas lian tutan sintenon pri Esperanto. Precipe lia agado dum la lasta jaro, liaj necedemo kaj la obstino kiuj ne volis akcepti malfavoran situacion, stampas lin vera apostolo de la Majstro.

M.S.



Dankon !

Pro la neeblo skribi al ĉiuj, kiuj montris al ni sian intereson kaj iel sentis kaj apogis niajn malfacilaĵojn kaj ĉagrenojn dum la longa periodo de la malpermeso de Esperanto en Portugalujo, al ĉiuj ni nun dankas la amike montritan kunsenton, precipe al U.E.A., U.L., Brazila Ligo Esperantista, la Akademio de Esperanto, kaj al Ges-oj Isbrucker, Goldsmith, Steiner, U. Hoffmann kaj Carlos Domigues.

En Portugalujo, krom la grupo da geesperantistoj, kiu akompanis ĉiujn paŝojn, ni ŝuldas dankon al la Ĝenerala Direktoro de la Cenzuraj Servoj, S-ro Kolonelo D-ro Armando Larcher (adr. : Palácio Foz, Calçada da Glória, Lisboa), al kiu ĉiuj Esperantaj Asocioj devus Esperantlingve montri justan kaj sinceran dankemon.

La ŝtormo forpasis kaj nun al la laboro ! *Saldanha Carreira.*



ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj :

I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum, 298m. I. (ĉiun duan lundon): V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 25.61m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m., sur 19.60m.
	23.30–23.45	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	17.20–17.40	Roma. 25.24m., 31.35m. P. Radio Roma—Esperanto. Via Vittorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 347m., 48.39m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	16.00–16.20	Roma. Kiel merkrede.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Unufoje ĉiun duan monaton la stacio NCRV, Schuttersweg 8, Hilversum, Ned. elsendas paroladon en Esperanto. La venonta elsendo okazos vendredon 1 junion je 17.30-17.45 laŭ ondlongo 402m. Nepre aŭskultu kaj skribu por plioftigi la programojn.

Senpaga ilustrita programo havebla ĉe la svisa stacio.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

V. La stafeto

DOKTORO WELCH ne estis la sola homo, kiu kelkfoje dum la tago vizitis la poŝtoŝtacion en Nome. La dua viro, kiu senĉese forsendis la telegrafajn depeŝojn en la civilizitan mondon, estis la ĵurnalisto Hilton.

Jam de la unua interparolo kun la kuracisto estis al li klare, ke temas pri okazo tre grava, kaj li, kiel ĵurnalisto, tuj decidiĝis, ke li eluzos tion.

Li apenaŭ eksciis pri la epidemio, kiam li tuj forsendis al sia ĵurnalo detalan raporton, en kiu li priskribis la malesperan situacion en la plej norda urbo de la amerika kontinento. La ĵurnalo represis ĝin en okulfrapa aranĝo sur la fronta paĝo. Kaj ĉar la sciigon prete disvastigis ankaŭ la radio, post nelonge sciis pri la afero la tuta kultura mondo.

Nome kaj ĝiaj trafitaĵoj loĝantoj fariĝis la centro de la universala atento. Ne estis homo, kiu ne interesiĝis pri la dramo en la dezerta nordo.

Ĉiu nova depeŝo de Hilton estis sensacio. Ĵurnaloj presis apartajn eldonojn en centmilaj eldonkvantoj. La redakcioj estis superŝutataj per demandoj. Ariĝis sennombraj proponoj, kiamaniere oni povus transporti la seron el Nenana al Nome. Sed ĉiuj estis destinitaj al pereco nur pro tiu simpla kaŭzo, ke ili estis nerealegeblaj.

La aviadistoj, kiuj vidis en transporto de la sero unuavice aferon de sia profesia honoro, superŝutis per telefonaj demandoj la meteorologiajn staciojn. Inter ili estis ankaŭ tiuj, kiuj volonte riskus eĉ sian vivon, nur ke ili povu helpi la malfeliĉan urbon. Sed la informoj de la meteorologiaj stacioj estis tiom malfavoraj, ke ne estis eble doni permeson pri ekiro.

Kaj kiel proksimiĝis la paketo al Nenana, tiel kreskis la sufoka streĉo.

Kio sekvos ?

En la laborejoj, en la vendejoj, sur la stratoj, en la vagonaroj, en la oficejoj, en la kafejoj, ja eĉ en la lernejoj oni parolis pri nenio alia ol pri Nome. Ĉu la paketo restos en Nenana ? Aŭ ĉu okazos ia miraklo, kiu ebligos transporti la seron al la destinita loko ?

Tiuj estis momentoj, kiam la malfeliĉo vekis en la homoj la plej noblajn sentojn : kompaton al la suferantoj kaj klopodon helpi ilin.

Ĉefan vorton en la diskutoj havis kompreneble tiuj, kiuj konis Alaskon el propra sperto. Tiuj estis precipe la eks-orministoj, al kiuj prezentigis la alloga okazo por plivigli la rememorojn pri la malkvietaj jaroj de sia vivo. Ili rakontis pri kruelaj frostoj kaj teruraj ventegoj, pri la netraireblaj montpasejoj, el kiuj precipe la Chilcoota pereigis centojn da kuraĝaj aventuruloj, pri la krutaj glacirokoj kaj perfidaj abismoj, pri la bestaro, kiu

en vintro fariĝas tre danĝera—kaj per ĉiuj rakontoj ili vekis grandan intereson ĉe siaj aŭskultantoj—sed ili ne scipovis per ili konsoli.

Ju pli klare la homoj konstatis, ke en tiu ĉi lukto kun la senkompata naturo la homo estas senpova, kaj al malsanaj infanoj restas nenio alia ol la morto, des pli granda korpremiĝo kaptis ilin.

Tiu ĉi nubo de la sufoka streĉo estis subite distranĉita per blindiga fulmo :

Veturos stafeto !

Tiel, kiel en la naturo post ekflamo de la fulmo estas momento de tomba trankvilo, kiun en la sekvanta momento anstataŭas surdiga tondrobruego—ankaŭ la homoj legante la grandajn literojn pri la alaska stafeto restis kvazaŭ senkonsciigitaj. Sed poste ili ĝojegis kvazaŭ infanoj, kaj renkontiĝante, homoj ĉirkaŭbrakis nekonatojn, en la vagonaroj kaj ĉie, kie la homoj interrilatas, ekregis admirinda komplezo, komunikemo, ĝentileco kaj afableco—ĉar ĉiuj konsciiĝis, ke en tiuj ĉi emociaj momentoj la homaro donis sian plej belan frukton.

La stafeto fariĝis la devizo de la tago. La infanoj aranĝis stafetkurojn de la mateno ĝis la vespero : en la gimnastikejo, survoje al la lernejo kaj de la lernejo, sur la glitejo kaj dum la glitkurado. La plenkreskuloj rigardis ilin—kaj strange !—nun tute ne ĝenis ilin, ke la infanoj malhelpas ilian iron, ke ili krias kaj bruas. La plenkreskuloj rigardis ilin kun aprobaj ridetoj, ĉar ili ne vidis antaŭ si la ludantajn infanojn, sed kelkajn kuraĝajn heroojn, kiuj ĵus entreprenis neviditan vetveturon kun la morto.

Will Shannon, Wurd Kalland, Emil Erikson, Leonard Seppala, Gunnard Kasson !

La kvin nomoj, kiuj vigligis la mondon ! La kvin nomoj, al kiuj estis fiksitaj esperoj ne nur de tiu unu milo da loĝantoj en Nome, sed esperoj de la centmiloj kaj milionoj da homoj en la tuta mondo ! La kvin nomoj, kiuj vekis respekton kaj admiron, apenaŭ ili estis elparolitaj.

Io tamen bremsis la ĝojegon kaj entuziasmon. Tio estis la penso, kiel ili fartos dum la longa kaj danĝera veturo.

Al ĉiu el la kvin herooj, kies nomoj ĝis tiu tempo nenie estis legeblaj, estis direktitaj la esperoj de la mondo egalgrade. Ĉar ĉiu estis la kolono, la pilastro, kiu devas ne krevi. Ĉiu estis la ĉenero, kiu devas ne esti traŝirita. Sur ĉiu el ili kuŝis la sama kvanto de la respondeco. Se unu malsukcesos, la stafeto ne sukcesos.

La tuta mondo tremetis pri la sukceso de la plej kuraĝa veturo, kiun la historio konis.

Nur tiuj, kiuj estis la ĉefaj personoj en tiu ĉi grandioza lukto, estis trankvilaj. Ili ne pensis pri tio, ke ili faras ion eksterordinaran. En la senkompata lukto pri la taga pano ili lernis simplecon. Pro tio la taskon, kiun ili surprenis, ili taksis kvazaŭ ion memkompreneblan. Ie en la dezerto mortas homoj kaj estas en ilia povo savi ilin. Ĉu ili mem pereos plenumante ilian taskon ? Eble. Sed okazu kio ajn, ili faros ĉion, kio estos en iliaj

fortoj. Ja, kiel ili povus ankoraŭ unufoje en la vivo rigardi en la okulojn de homo, se ili dum tiaj cirkonstancoj restus hejme, en la komforto, en la varmo, apud la varmigita forno? Ĉu estas io pli simpla kaj pli komprenebla ol tio, ke ili veturas?

Kaj se iu montrus al ili la sensaciajn artikolojn en la ĵurnaloj, se iu dirus al ili, ke ili estas taksataj kiel la plej grandaj herooj de la nunaj tagoj, ili svingus per la manoj, kvazaŭ ili volus diri: “Eh, lasu nin trankvilaj. Tiaj bagateloj!”

Ĉiu ja ankaŭ erarus, kiu supozus, ke la stafeto ekveturis kun iaj ceremonioj.

Will Shannon alvenis kun sia sledo kaj kunjungaĵo de dek du hundoj al la stacidomo en Nenana; li anoncis sin ĉe la staciestro kaj atendis la alveturon de la lokomotivo.

Akompanis lin kelkaj amikoj, kiuj helpis al li kontroli la kunjungaĵon kaj premligi la rimenojn.

Kaj jam aŭdiĝis la fajfo. La lokomotivo ruliĝis al la stacidomo.

La lokomotivestro rapide desaltis kaj transdonis al la staciestro malgrandan paketon.

“Jen la sero,” li diris.

“Kaj ĉu tio estas ĉio?” miris la ĉirkaŭstarantoj pri la malgranda dimensio de la paketo, kiu pezis ne pli ol duonkilogramon. Ili ne povis kompreni, ke la vivo de multaj homoj povas dependi de io tiom malgranda.

“Jes,” ridetis la lokomotivestro. “Kaj kiamaniere vi forsendos ĝin pluen?”

Ne estis necese klarigi tion al li. Ĉar intertempe la staciestro transdonis la paketon al Shannon. Tiu metis ĝin en dikan felon, ĉirkaŭligis ĝin per fortikaj rimenoj kaj fiksas ĝin al la sledo.

Poste li adiaŭis per manpremo la lokomotivestron, la staciestron kaj amikojn, saltis sur la glitveturilon, eksvingis la vipon kaj—la stafeto ekveturis.

“Sukceson!” kriis ĉiuj.

Sed la unua viro de la stafeto tion jam ne aŭdis. Ne estis tempo por longa prokrasto. La konscio, ke ĉiu horo, eble ĉiu minuto povas signifi la savon de homa vivo, devigis rapidon.

Ĉio estis tiom simpla, kaj tamen en tiu simpleco kuŝis tiom da vireco kaj hardeco, sed ankaŭ tiom da delikateco kaj amo!

La vojo al Tolovana kondukis tra la vasta arbaro sur la maldekstra bordo de Tanana, kiu enfluas en la plej grandan riveron Yukon. Sed ĝi estis tiom neĝblovita, ke Will Shannon estis devigata veturi tra la vojo-nevojo.

Kiam la stafeto forlasis Nenana, la barometro montris —35 C. Sed blovis tiom forta vento, ke la frosto estis duoble sentata. Will Shannon surhavis pezan peltmantelon, peltan ĉapon, altajn botojn kaj varmajn mufogantojn. Kaj li tamen veturinte kelkajn horojn frostotremis. De

tempo al tempo li kuris apud la kunjungaĵo por iomete plirapidigi la cirkuladon de la sango.

Antaŭ la vespero la vento ĉesis. Will Shannon eluzis la trankvilajn momentojn por nutri la hundojn. Kaj poste daŭrigis la veturon.

En la mallumo li progresis multe malpli rapide ol tage. La kunjungaĵo kelkfoje renkontis altan neĝamason, la glitveturilo multfoje preskaŭ renversiĝis koliziinte kontraŭ falintan arbon. La hundoj elĉerpiĝis, kaj ankaŭ Will Shannon sentis lacon en la tuta korpo. Sed eĉ ne unufoje li sentis tenton ripozi. Li bone konsciis, ke la savo de multaj homoj kuŝas en liaj manoj kaj laŭ tio li agis.

En Tolovana oni atendis lin jam en la vesperaj horoj. La satnutrita kunjungaĵo de Wurd Kalland dormetis en la stacidomo. Wurd Kalland kun siaj amikoj malpacience rigardis la horloĝ-montrileton. Ĉu Will Shannon alvenos ?

Li alvenis nur antaŭ noktomezo. Malgraŭ tio, ke li estis tre lacigita, li ridetis.

“Feliĉan vojaĝon !” li deziris al Kalland, transdonante al li la paketon da sero.

Wurd Kalland metis la seron sur la sledon, svingis manon je saluto kaj ekveturis. Tuj poste flugis al Nenana, al Hot Springs kaj al Nome la telegrafa depeŝo, ke Will Shannon feliĉe alvenis kaj Wurd Kalland daŭrigas la veturon.

Wurd Kalland havis antaŭ si ĉirkaŭ okdek kilometrojn da veturo. La plej danĝera estis la transveturo trans riveron Tanana. Ĝi estis frostiĝinta unu metron kaj ankoraŭ pli profunden, sed en la lokoj, kie estis rapidfluo, troviĝis nur maldika glacia tegaĵo. Sufiĉus surveturi tian lokon kaj

En la mateno la temperaturo okulfrape malaltiĝis. Sur la firmamento aperis nuboj, kiuj anoncis proksimiĝantan neĝventegon.

Wurd Kalland instigis la hundojn al pli granda kaj ĉiam pli granda rapideco. Kaj kiam li fine, duonfrostiĝinta, ekvidis la domojn de Hot Springs, aperis sur lia frostorigida vizaĝo kontenta rideto.

Kaj denove la sama bildo kiel en Tolovana : nova kunjungaĵo, nova viro kaj nova ĝojplena telegramo pri la venko de Kalland.

Emil Erikson veturis el Hot Springs al Ruby. La distanco, inter tiuj ĉi du lokoj, estis pligrandigita per tio, ke li devis dufoje traveturi la riveregon Yukon.

Kiam li forlasis Hot Springs, la ĉielo estis malserena per pezaj nuboj kaj la vento eĉ ne blovetis. Emil Erikson konis tian trankvilon. Li sciis, ke post ĝi kutime venas ventego, en kiun eĉ la plej kuraĝa nordulo ne kuraĝas iri. Kaj li tamen ekveturis. La malesperanta Nome atendis.

La ventego ekfuriozis tuj post tagmezo. Samtempe kun ĝi falegis el la plumba ĉielo tuta torento da neĝo. La ventego pelis ĝin antaŭ sin, ĝi muĝis, fajfegis, rompis la arbojn, blindigis la veturanton kaj hundojn. De tempo al tempo tiel mallumis, ke oni ne povis vidi eĉ unu paŝon antaŭe.

La hundoj jam nur sin trenis. Emil Erikson nur per streĉo de ĉiuj fortoj ne falis. Sed la stafeto veturis. La posttagmezon, la tutan nokton kaj ankoraŭ unu tutan tagon. Tridek tri horojn da seninterrompa veturo. Tridek tri horojn da superhoma sufero. La 29-an de januaro je la naŭa vespere Emil Erikson atingis duonmorta sian celon—Ruby.

Tie jam atendis lin viro, kiu estis traveturonta la plej longan kaj plej danĝeran parton de la tuta stafeta veturo—Leonard Seppala.

(daŭrigota)

Belartaj konkursoj de U.E.A.

DUM la 36-a U.K. de Esperanto en Munkeno okazos, same kiel la pasintan jaron en Parizo, Belarta Konkurso. La Estraro de U.E.A. ĵus akceptis la novan regularon. Ĝia teksto aperos en la Bulteno de la 36-a U.K. kaj la konkursantoj estas petataj atente ĝin tralegi kaj agi laŭ ĝiaj principoj por faciligi la laboron. La Estraro decidis, ke ĉijare okazu konkurso pri jenaj branĉoj: (1) poezio originala, (2) poezio traduka, (3) prozo originala, (4) prozo traduka, (5) teatraĵeto originala, (6) teatraĵeto traduka. La poemoj povas havi maksimume 36 versojn, la prozaĵoj maksimume po 200 maŝinskribitaj linioj kaj la ludodaŭre de la teatraĵoj devas esti maksimume 25 minutoj.

La personoj, kiuj deziras konkursi, estas petataj sendi tuj al ĉijara sekretario pri la Belartaj Konkursoj

de U.E.A., S-ro Reto Rossetti, art-instruisto, 27 Harling Drive, TROON, Ayrshire, Skotlando, la manuskriptojn en 5 (kvin) kopioj. Ĉe tradukoj oni nepre aldonu la permeson de la aŭtoro kaj kvin kopiojn de la originalo.

La sekretario de la Konkurso informos ĉiun konkursanton pri la rezulto de la konkurso plej malfrue la 20an de Julio. Dum la U.K. estos legataj aŭ ludataj nur la premiitaj konkursaĵoj.

Por ĉiuj informoj rilate al la Belartaj Konkursoj la interesiĝantoj bonvole sin turnu rekte al S-ro Reto Rossetti.

Grava atentigo: Escepte, por la nunjara konkurso, la limdato por sendo de la manuskriptoj (konkursajoj) al la sekretario, S-ro Reto Rossetti, estas la 25-a de Junio.

Gratulo

Ni volas direkti al S-ro A. W. Withoos, D. de U.E.A. en Eindhoven, Nederlando sinceran gratulon kaj dankon pro modela agado. S-ro Withoos dissendas cirkulerojn al konataj samideanoj en sia loko kun la celo varbi ilin por la Asocio. Aliaj imitu tiun laŭdindan klopodon!

Sarlando

Nova agado: Sarlanda Esperanto-Asocio reviviĝis. En la lastaj jaroj la movado tie iom velkis, sed per la plej granda gazeto *Saarbrücker Zeitung* informoj estas daŭre donataj al la publiko. Simile ankaŭ Radio Saarbrücken ofte elsendas informojn pri Esperanto. La Asocio fondiĝis 18 feb. 1951. Adresoj: S-ro A. Omlor, Beethovenstr. 36, St. Ingbert, Saar.

D-ro Alfred Metraux (fako de Sociaj Sciencoj en Unesko) :

La alfabeto de la reĝo

Komentaro pri “rasa supero”

LA riĉan komplikon de civilizo en progresintaj landoj oni ofte uzas kiel argumenton por elmontri la bazan intelektan superon de la respektivaj “rasoj” ĉefaj en tiuj landoj.

Kompari diversajn kulturojn por pruvi, ke iu rasgrupo estas malsupera rilate alian, estas procedo de rezonado sen valoro. La fundamentaj eltrovoj sur kiuj nia tuta civilizo estas konstruita—la fajro, la teksado, la potarto, la agrikulturo, la best-bredado—estis faritaj de homoj, kies haŭtkoloro hodiaŭ estas nekonata. Oni povus eĉ diri, ke primitivulo loĝanta en izolita regiono, kun mal multe da kulturaj avantaĝoj, bezonis multe pli da genio por eltrovi la pafarkon aŭ la bumerangon*, ol la inventistoj hodiaŭ en sia penado fendi la atomon kaj perfektigi maŝinojn, kiuj estas la fiero de ĉi tiu moderna epoko. Elvolvi novan teknikon el nenio, kiel oni povas priskribi ĝin, evidente estas multe pli malrapida kaj pli malfacila procedo.

La atingoj de homo estas limigitaj de lia kultura fono. La historio pri Reĝo Njoya de la *Bamungento* en Kameruno, kiu mem kreis sistemon de skribo kaj instruis sian popolon pri ĝia uzo, devas helpi misinformitajn skeptikulojn venki siajn dubojn pri la krea spirito de la popoloj de Afriko.

En 1899, kiam la Germanoj okupis lian regnon, Njoya bezonis komunikiĝi

kun siaj vilaĝestroj kaj kun tiuj el lia popolo ligitaj kun la germana Estraro, sed li ne volis, ke la Germanoj sciu, kio estas en liaj leteroj. Li tial decidis eltrovi skribon, kiun la eŭropanoj ne povos kompreni. Kunvokinte siajn ĉefojn, li klarigis sian planon kaj petis ilian helpon je trovo de signoj por ĉiu vorto de la loka lingvo.

La sistemo de skribo ellaborita de la reĝo kunlabore kun liaj konsilantoj komenciĝis kiel bildlingvo laŭ signoj, je kiu ĉiu signo prezentis aŭ desegnon pri specifa objekto aŭ la “materiigitan formon elvokitan de abstrakta ideo”. Ĉiu signo do respondis al iu vorto, sed sen rilato al la nombro de silaboj en tiu vorto.

Kelkajn jarojn poste Njoya ekhavis ideon, kiu vere estis genia : vortoj ne plu prezentiĝu per desegnoj, sed *la samaj desegnoj reprezentu grupojn de sonoj*, tiel kreante silaban skribon.

Ĉi tiuj signoj akiris pure fonetikan kaj konvencian valorojn anstataŭ sugestii objektojn aŭ ideojn. Ekzemple kalabaso (*ka*) unue montriĝis per desegno de kukurbo ; poste ĉi tiu, sed simpligita, desegno estis uzata por indiki la silabon *ka*, kiu formas parton de multaj vortoj.

Alfabeto naskiĝas

En la daŭro de kelkaj jaroj Njoya progresis de bildskribo al fonetika sistemo—atinginte kion la Egiptoj atingis, sed tre neperfekte, post

* bumerango=jetklabo de aŭstraliaj indiĝenoj

Actual value	Word	Meaning	1907	1911	1916	1918
<i>F, fa, 8</i>	<i>Fama</i>	<i>Eight</i>				
<i>F, fè</i>	<i>Fè</i>	<i>Burn & work</i>				
<i>F, fo</i>	<i>Fom</i>	<i>King</i>				
<i>F, fou</i>	<i>Fou</i>	<i>Measure</i>				
<i>G, ga</i>	<i>Ngè</i>	<i>(Chose-faite)</i>				
<i>G, go, 10</i>	<i>Ngom</i>	<i>Ten</i>				

Traduko de la anglalingvaj vortoj : *Actual value* = fakta valoro ; *Word* = vorto ; *Meaning* = signifo ; *Eight* = ok ; *Burn & work* = brul kaj labor ; *King* = reĝo ; *Measure* = mezur ; *Ten* = dek.

jarcentoj da stumblaj provoj. Dum kelka tempo la skribsistemo de Reĝo Njoya restis duone bilda, duone fonetika, tamen la tutan tempon la silaba flanko estis perfektigata.

Post kvin jaroj la reĝo, ĉifoje sub la influo de observoj faritaj en misiista lernejo, enkondukis novan reformon donante al sia sistemo pure alfabetan karakteron. Li decidis konservi 80 el la 350 originaj signoj, kaj tiujn prezentantajn la unuajn dek numeralojn. Li dekretis, ke ĉiu el la alfabetaj signoj reprezentu nur unu sonon, kaj la nombraj signoj tenu krome la valoron de numeraloj.

Ĉi tiu lasta paŝo al alfabeto skribo neniel estis perfekta. La reĝa fonetikisto ne sukcesis tute liberigi sin de silabismo kaj tial la fonetika valoro de la 80 signoj ne ĉiam estis klare

difinita. Konscia pri la mankoj en sia sistemo, li faris plurajn provojn simpligi ĝin. En 1916, la jaro kiam lia skribsistemo estis la temo de la historio ĉi tie skizata, lia sistemo ŝajne estis destinita fariĝi pure alfabeto. La signoj havis ĉiam malpli da rilato kun primitivaj bildsignoj kaj fariĝis literoj kun ĉiam pli simplaj konturoj.

Jam elvolvinte metodon de skribo, ĉi tiu saĝa viro iniciatis grandskalan kampanjon por instrui la alfabeton al sia popolo. Li aĉetis de la blankuloj ardezojn kaj mem instruis al lernantoj, kiuj siavice fariĝis instruistoj. Kiam la periodo de instruado finiĝis la reĝo daŭre korespondis kun ili kaj tiu interŝanĝo de leteroj konservis ilian intereson. Jam antaŭ la mezo de 1907 pli ol 600 el liaj

regatoj sciis legi kaj skribi. Njoya starigis administraciojn, arkivejon de publikaj registroj kaj elektis Registriston de spezoj.

Oni ja povus provi malgrandigi la genion de Njoya per aserto, ke la ideon pri skribo li probable ricevis de la Araboj aŭ la blankuloj. Tio tamen neniel deprenas de la signifo de lia eltrovo. Povas esti, ke li sciis, ke la blankuloj uzas skribajn signojn por interkomunikiĝado, sed li certe ne povis scii ion pri la sistemo. Lia propra sistemo originis en liaj indiĝenaj inteligento kaj iniciatemo. Ni krome pripensu, ke ignorante kaj la tempon kaj la tradicion, li atingis en kelkaj jaroj rezultojn, kiujn atingi okupis aliajn skribsistemojn dum jarcentoj, eĉ jarmiloj.

La tiel nomita “indiĝena” aŭ “barbara” stato ne originas en ia ennaskita nekapablo. Ĝi simple estas unu transira formo de kulturo inter aliaj, simile transiraj. Nek la primitivaj nek la progresintaj civilizoj estas esplorintaj ĉiujn eblojn de la homaro. Unu afero kiu tamen ŝajnas certa, estas la aserto en la Deklaro pri Raso publikigita de Unesko, kiu diras, ke “la amplekso de mensaj kapabloj en ĉiuj etnaj grupoj estas pli malpli la sama”.

Trad. M.S.

(Iom mallongigita represo el *United Nations News* vol. 6, n-ro 1, jan.-feb. 1951 kun afabla permeso de la redaktoro al kiu ni esprimas dankon ankaŭ pro prunto de la patrico.—Red.)

S-ro Tadros Megalli : Responde al pluraj demandintoj, la Centra Oficejo de U.E.A. informas, ke la vojaĝoj de S-ro Megalli ne okazas sub aŭspicioj de U.E.A.

Niaj mortintoj

Ni eksciis, kun granda bedaŭro pri la forpaso de la jenaj gesamideanoj, al kies parencoj ni esprimas nian profundan kondolencon. Red.

Couvert, Michel, 7-jara filo de D. de U.E.A. en Ouezzane, Maroko, tragedie mortigita de kamiono 14 de marto.

Hagerman, F-ino J., en Klippan, Svedlando, 7 dec. 1950.

Reed, S-ino V., 30 marto 1951 en Letchworth, Anglujo, 67-jara. Dumviva Membro de U.E.A. Malavara kaj fervora subtenanto de nia movado, aparte sur la kampo de “adoptado” de samideanoj en aliaj landoj.

Stevenson, S-ro R., 76-jara, Delegito en Pontypridd, Kimrujo, 27 feb. 1951.

INFORMO PRI SOCIALISMO

Socialismo estas la mondskala movado de la laborista klaso al emancipiĝo—la movado de laboristoj per mano kaj cerbo—la movado de ĉiuj kiuj laboras por salajro. Socialismo ankoraŭ ne estas aplikata—ie ajn—ĉar ĝin povas efektivigi nur matura laborista klaso. Rigardu la faktojn. Legu la *Deklaracio de la Principaro* (nun eldonitan por la unua fojo en Esperanto) de la Socialista Partio de Granda Britujo kaj ĝiaj parencaj partioj en aliaj landoj.

Skribu hodiaŭ por senpaga specimeno.

LA SOCIALISTA PARTIO

de

GRANDA BRITUJO

52 Clapham High Street, London, S.W.4
Britujo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 237

4-an de Aprilo 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Marto, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951.
Asociaj membroj	3383	3241
Individuaj membroj :		
MJ	575	596
MA	3472	3763
MS	256	248
Patronoj ..	14	16
DM	196	211
HM	56	58
	— 4569 —	— 4892 —
	7952	8133
	—	—

LANDAJ ASOCIOJ

Nova aliĝinta asocio : Hispana Esperanto-Federacio, Ruzafa 7, Valencia.

Eksiĝis kiel aliĝinta asocio : Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko.

FAKA ASOCIO. Kontrakto pri kunlaboro konforme al artikolo 14 de nia Statuto estas subskribita kun Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Graz. FD (Migrado) : E. Lederer, Reichstrasse 75, Graz-Andritz. Tel : 1883.

FD (Scienco) : D-ro W. Flick, Hallerschlossstrasse 35, Graz-Waltendorf.

Ottendorf. FD (Instruado) : F-ino J. Konrad, Ottendorf bei Gleisdorf.

Belgujo

Antwerpen. FD (Bestprotektado) : J. Jacobs, Boomsesteenweg 444. Tel : 377120.

Bruxelles. FD (Presado—silka skreno) : M. Jirousek, 107 Rue Joseph II, Bruxelles 4. Tel : 12.23.96.

Brazilo

João Pessoa. D : R. Lemos Diniz, Rua Duque de Caxias 413-I. Tel : 1913.

VD : M. Nery, Rua Catedral 25. Tel : 1825.

FD (Instruado) : La VD.

Britujo

Coventry. D : E. F. Earle, 213 Barnaby Road, Radford.

London. FD (Komerco) : J. G. Fowler, c/o Anglo-Mercantile Co. Ltd., 20 Eastcastle St., W.1. Tel : MUSEum 2712.

Lydd. D : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Ceské Budějovice. D : B. Vurm, Doudlebská 896. Tel : 266.

Finnlando

Helsinki. FD (Geodezio) : D-ro U. Pesonen, Museokatu 17. Tel : 92 777.

Francujo

Muret (Haute-Garonne). D : S-ino L. Dupont, 32 Avenue des Pyrénées. Tel : 121.

Paris. FD (Turismo) : J. Vautrin, 47 Rue du Chemin Vert, Paris 11.

Reims. VD : vakas.

Suippes (Marne). D : E. Bidoit, Cours Complémentaire.

Germanujo

Niedermarsberg. D : F. Schneider, Hauptstr. 33, (21 b) Niedermarsberg. Tel : 252.

Hispanujo

Barcelona. FD (Komerco—Peltaĵoj) : R. Cirera y Rodellas, Libreteria 7. Tel : 21 91 22.

Hungarujo

Zalaszentgrót. D : G. Mangliár, Templontér 2.

Irlando

Belfast. VD : A. R. Campbell, 15 Delhi St., Ormeau Road.

Izraelo

Haifa. FD (Asekuro) : La D. Tel : 66021.

Jamaiko

Kingston. D : R. G. Robbins, Botany Dept., University College of West Indies, Mona St. Andrew. Tel : 7435.
FD (Magio) : La D.

Nederlando

Den Haag. FD (Laktoprodukto) : C.M.N.T. Op't Roodt, Erasmusweg 185.

Svedujo**Hälsingborg.** VD : vakas.**Klippan.** VD : vakas pro morto.**Usono****Stafford Springs** (Conn.) D : Raymond R. Neri, R.F.D. 1. Tel : 104-J3.**NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ**

Gill, P. L., London, Anglujo

Murray, J. H., Dearborn, Mich., Usono

PATRONOJ 1951

16. Dusausoy, A., Parĭs, Francujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

228. Belinfante, F. J., Lafayette, Ind., Usono

229. Breth, F. W., Petrolia, Penn., Usono

230. Ericson, D. B., Palisades, N.Y., Usono

231. Ridpeth, T. H., London, Anglujo

232. Zeiner, B. R., Barry, Kimrujo.

233. Latimer, R. F., Bentley Park, W. Aŭstralio

234. Ramsay, C., East Devonport, Tasmania, Aŭstralio.

235. Morris, W., Birmingham, Anglujo

236. Smith, N. R., Swindon, Anglujo

237. Maier, K., Tientsin, Ĉinujo

238. Pot, C., Slikkerveer, Nederlando

239. van Dijk, J. P., Oosterland, Nederlando

240. Thibon, J., Suresnes, Francujo

241. Egenoldo Sueffert, E., Porte Alegre, Brazilo

242. Gomes Cavaco, J., Rio de Janeiro, Brazilo

243. Wantuil de Freitas, A., Rio de Janeiro, Brazilo

244. Portela, B., Pedrã Azul, Brazilo

245. Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo

246. Clark, F., Wunstorf, Germanujo

247. Schiava, V., Jinja, Ugando

248. Churchill, L. A., Derby, Anglujo

249. Alavedra, V., Tarrasa, Hispanujo

250. Fournière, S-ino G., Longjumeau, Francujo

251. Strohl, P., Bonaké, Eburya Bordo.

252. Gaillard, A., Paris, Francujo

DONACOJ. A. W. Moody 1ŝ. 6p., H. De Jong 4ŝ. 6p.**Sinceran dankon al ĉiu helpanto.**C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Internacia Konkurso 1951

LA monataj ciferoj por membroj trovas sian eĥon ĉi tie en la tabelo de la konkurso, kaj ni vidas la strebadon de la diversaj landoj al la unua loko. Finnlando sukcesis konservi sian pozicion ĉe la kapo, sed ĉe la tuj sekvantaj landoj vidiĝas etaj ŝanĝoj. La nombro da landoj atingintaj pli ol 100% altiĝis de kvar ĝis sep, kaj la diferenco inter la ciferoj de tiuj sep—kiel ankaŭ de pluraj preskaŭ ĉe la sojlo de la 100%—estas tiel malgranda, ke nur kelkaj atingoj povos radikale ŝanĝi la situacion. Ni volas denove memori, ke en la plej sukcesa lando la Landa Asocio ricevos premion 10 pundojn, kaj **ĉiu tiea delegito ricevos libro-premion.** Do, laboru konstante!

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando ..	2000	2330	116.5
2.	Germanujo ..	2400	2760	115.0
3.	Portugalujo ..	600	655	109.2
4.	Italujo ..	1700	1855	109.1
5.	Japanujo ..	800	865	108.1
6.	Maroko ..	400	415	103.7
7.	Urugvajo ..	250	255	102.0
8.	Brazilo ..	2500	2470	98.8
9.	Belgujo ..	2100	2018	96.1
10.	Sudafriko ..	250	235	94.0
11.	Britujo ..	12000	10845	90.4
12.	Danlando ..	2800	2505	89.3
13.	Izraelo ..	300	270	90.0
14.	Svislando ..	1400	1235	88.2
15.	Hispanujo ..	1100	880	80.0
16.	Kanado ..	250	185	74.0
17.	Nederlando ..	5000	3595	71.9
18.	Norvegujo ..	1400	1005	71.6
19.	Aŭstralio ..	900	635	70.5
20.	Argentino ..	800	550	68.7
21.	Francujo ..	5700	3859	67.7
22.	Irlando ..	250	165	66.0
23.	Svedlando ..	5300	3315	62.4
24.	Usono ..	3000	1654	55.1
25.	Novzelando ..	800	405	50.6
26.	Kubo ..	250	105	42.0
27.	Aŭstrujo ..	1000	410	41.0
28.	Islando ..	500	55	11.0

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Certe respondos. A. Chmielewicz, 324 South St., Philadelphia 47, Penna., Usono.

Antonio Pastor, Ercilla 43, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondas.

Mário Loff, C.P. 1029, Luanda, Angola. Portugala Okcidenta Afriko, kun la tuta mondo pri ĉiaj temoj. Nepre respondos.

AAAAAAAAAlt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

João Simões, Vila Ripamontti, Benfica-Lisboa, Portugalujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn. Nepre respondos.

Turisma Servo : Rezervas malmultekoste hotelĉambrojn en okcident-Eŭropo, prizorgas gvidadon, turismajn prospektojn (afranku filatele). Loeckx, Konijnenperken, 109, Brussel-Bosvoorde, Belgujo.

Kiu desegnos preseblajn bildojn pri infanoj, ludiloj, k.t.p. por ilustraj poemetojn de Nenjo Rimanto, 1 Beaconsfield Terrace, Bodmin, Cornwall, Anglujo ?

Florkulturisto ĝojus korespondi kun nederlanda samprofesiulo. Laurent, Route St. Menoux, Moulins (Allier), Francujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekretario, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Anglujo. Malgranda gastejo fronte kontraŭ marc. Apud Dover. Esperanto parolata. S-ino Perry, 54 The Downs, Herne Bay, Kent.

Essen, la koro de la germana karbmineja regiono, invitas la tutan mondon korespondi reciproke kaj viziti ĝin. Tranokteblecoj laŭplaĉe en malmultekostaj aŭ luksaj hoteloj aŭ ĉe samideanoj. Vizitservo konigos la mirindan ĉirkaŭaĵon. Skribu al D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

25-jara fraŭlo (lernanto) deziras korespondi kun fraŭlinoj tutmonde. Skribu al BM/KYHN, London, W.C.1, Anglujo.

Vesako, 2495 B.E., Sankta Plenluno, Majo 21 : La Budhana Ligo Esperantista deziras Pacon kaj Benojn al ĉiuj Estaĵoj ĉie ! (Vidu Jarlibron, p. 28).

S-ro Silvia Junior, C.P. 1338, Luanda, Angola, Portugala Okcidenta Afriko, interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn. Skribu tuj al li. Li nepre respondos.

Atentu ! Ni tutkore petas al ĉiuj legantoj ke ili bonvole skribu Esperantlingve al : Club Filatélico de Portugal (Portugala Filatela Klubo), Apartado 869, Lisboa-C., Portugalujo, petante senpagan ekzempleron de ties bulteno kaj informojn pri la Klubo. Ne forgesu !

Intersteno : dua konkurso. Mendu presaĵojn ĉe C. Daglio, via Campanella 51, Tortona (Aless.), Italujo (senpage), aŭ ĉe nacia peranto de Intersteno (pk. kun pagita respondo aŭ, en letero, pm. por enlanda afranko de pk.)


80 Japanaj gejunuloj deziras korespondi kun vi. Skribu al Sakamoto-Syozi, Oosaka-hu Suita si Senriyama Daigakumae, Japanujo.

Se viserĉas librojn, ĵurnalojn, poŝtmarkojn, bildojn, dokumentarojn kaj aliajn Skribu al : Champagne, 11 rue François I, Vanves (Seine), Francujo. Atentu : Mi respondas nur se mi povas kontentigi, indikante mian propran deziron. Mi korespondas en lingvoj : Esperanta, franca, angla, hispana, germana, itala, rusa.

Okaze de la 40-jara jubileo de sia ekzisto Esperanto-Societo Düsseldorf aranĝos varbekspozicion kaj letervesperon la 16an de Junio 1951. Bonvolu sendi materialon : afiŝojn, broŝurojn, leterojn, salutkartojn (prefere bildflanke kaj filatele afrankitajn) k.t.p. Ni garantias nepran respondon al ĉiuj. Sendaĵojn al S-ro Josef Haus, Am Gatherhof 43, (22a) Düsseldorf-Rath, Germanujo.

Angla samideanino, instruita, mezaĝa, reironta Italujon en Junio/Julio, deziras poste kontakti Esperantistojn en Jugoslavujo. Prefere ŝi deziras malkaran gastigon ĉe Dalmacija familio interesiĝanta pri angla lingvo. Skribu al BM/BENF, London, W.C.1, Anglujo.

La popolaltlernejo de la ĉefurbo Bonn de la okcidentgermana respubliko aranĝos Esperanto-varbekspozicion dum la monato Septembro ĉijare. Bonvolu sendi ĉiuspecan propagandmaterialon, bildpoŝtkartojn (poŝtmarkoj bildflanke), broŝurojn, prospektojn, gazetojn, librojn, k.t.p. al la delegito de UEA, Ernst Kind, Kirschallee 5/II, Bonn, Germanujo. Respondo garantiata.



XXIX INTERNACIA FOIRO DE PADOVA

(ITALUJO)

9-24 JUNIO, 1951



INTERNACIA FOIRO DE PADOVA disponas je aparta kvartalo de 96.000 m² speciale konstruita laŭ plej modernaj kaj raciaj vidpunktoj.

AL INTERNACIA FOIRO DE PADOVA dum 1950 aliĝis 3107 Firmoj el kiuj 982 eksterlandaj el 26 nacioj ; vizitis ĝin 843.000 personoj el kiuj 14.907 eksterlandaj.

AL INTERNACIA FOIRO DE PADOVA dum 1950 oni petis el eksterlando, por varoj en ĝi venditaj, ennaciigon por sumo de 2.362.851.863 it. liroj.

AL INTERNACIA FOIRO DE PADOVA eksterlandaj specimenoj ĝuas je libera traŭo tra landlimo kaj provizora kvarmonata import-permeso.

INTERNACIA FOIRO DE PADOVA estas je dispono de ĉiulandaj industriistoj, komercistoj kaj vizitantoj por prospektoj kaj informoj ĉiuspecaj en ĉefaj lingvoj kaj ESPERANTO.

ESPERANTO-OFIGEJO DE FIERA DI PADOVA (ITAL.)

